

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Intervjuo kun Giorgio  
Silfer

Sukcesaj septembraj  
aranĝoj en Poznano

Landaj kongresoj en  
Koreio, Japanio, Ĉeĥio  
kaj Meksiko

Du lingvaj festivaloj en  
Ruslando

Trevor Steele:  
“Ĉu malesperi?”

Kirurgo Ŝumakov el la  
konstelacio Skorpio

Poemoj de Afanasij Fet

Tomas Tranströmer,  
nobelpremiito 2011



2011

11

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2011. №11 (205)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Andrej Peĉonkin, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2012**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 550 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto "avko-u" ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2011.

"La Ondo de Esperanto" (Волна эсперанто). 2011, №11 (205).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто. Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 октября 2011 г.

Цена свободная. Тираж: 550 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Ne nur papere

[Ĉi tiun tekston Aleksej Korĵenkov prezentis la 25an de septembro en kunveno pri elektronika eldonado kadre de ARKONES 27 en Poznano.]

Ni strebas sekvi la ĉefajn tendencojn en la elektronika eldonado. Ekde januaro 1998 la tuta materialo de *La Ondo de Esperanto* estis plene publikigata rete en la hiperteksta formato (t. e. prezentomaniero, dosierformo) "html".

Post kelkaj jaroj evidentiĝis, ke ĝuste pro la pleneco de la senpaga reta versio pluraj legantoj preferas legi ĝin rete sen aboni. Do ekde 2005 en la reta versio de *La Ondo* aperas nur la plej grava materialo. Sed kelkaj personoj, kiuj kutimiĝis legi la tutan Ondon rete, diris al ni, ke ili ŝatus daŭrigi la legadon de *La Ondo* en la reto, eĉ se necesos modesta pago.

Sed post iom da pripensado ni malakceptis ĉi tiun ideon, ĉar ni konstatis, ke neesperantaj revuoj ofertas al siaj elektronikaj abonantoj ne retejon kun hipertekstaj versioj, sed abonon en portebla dokument-formo "pdf", kiu donas al la elektronikaj abonantoj la saman revuon, kiun havas la papera abonantoj. Post kelkaj eksperimentaj numeroj, la 1an de januaro 2007 ekaperis pdf-versio de *La Ondo*. Ekde tiam la unuan tagon de ĉiu nova monato la abonantoj ricevas — per elŝutado aŭ per retroŝto — la plej aktualan *Ondon*.

La statistiko montras, ke la elektronika versio iĝas ĉiam pli populara: nun ĉiu sesa *Ondo*-abono estas elektronika.

| Jaro  | Abonoj entute | e-abonoj | %     |
|-------|---------------|----------|-------|
| 2007  | 539           | 19       | 3,5%  |
| 2008  | 573           | 43       | 7,5%  |
| 2009  | 543           | 52       | 9,6%  |
| 2010  | 509           | 61       | 12,0% |
| 2011* | 545           | 93       | 17,0% |

\* Je la 1a de septembro 2011. Ĝis la jarfino aldoniĝos kelkaj pliaj abonantoj, sed la proporcio apenaŭ grave ŝanĝiĝos.

La jam aperintaj elektronikaj *Ondoj* iĝos publike kaj senpage legeblaj kun kvinjara prokrasto, do en la venonta jaro ni enretigos la tutan jarkolekton 2007.

Ni hezitis pri libroj, ĉar la aktualeco, la ĉefa avantaĝo de elektronikaj revuoj, malpli gravas por la libroj. Sed pasintjare ni ekpretigis ankaŭ elektronikajn librojn (= e-libroj, bit-libroj). Je la nuna momento en nia retkiosko estas ok senpagaj e-libroj, unu aĉetebla e-libro (elŝutebla por konatiĝo kiel provlibro), kaj du numeroj de *La Ondo*. La uzataj dosierformoj estas "pdf" kaj "epub".

Laŭ la statistiko, oni elŝutis jam pli ol dek mil ekzemplerojn de niaj e-libroj. La plej ofte legata estas tiu, kiu estis plej frue alŝutita — *La Pika Damo* de Puŝkin. Da ĝi estas elŝutitaj 1216 ekzempleroj en la pdf-versio kaj 669 ekzempleroj en la epub-versio, sume 1885 ekzempleroj. Tiom da venditaj ekzempleroj certe ne havus papera libro, se ĝi ekzistus.

Ni planas baldaŭ prezenti en tute nova e-libro la sep komencajn ĉapitrojn de la Dikensa *Pikviko* en la traduko de Bill Auld, kiu en 1999 komencis sian laboron, sed ne povis fini ĝin. Vizitu nian retkioskon:

<http://esperanto.org/Ondo/Libroj/Libroj.php>

Aleksej Korĵenkov  
Aleksander Korĵenkov

**La kovropaĝa foto** el la parko de Pavlovsk, apud Peterburgo memorigas, ke ĉi tiu kajero estas la lasta aŭtuna *Ondo*. La nova abonperiodo komenciĝas. La *Ondo* jam aboneblas por 2012. Ne nur papere. (Foto el *PressFoto*)

# La Esperanta Civito progresas al nova etapo

Giorgio Silfer estas la nuna Konsulo de la Esperanta Civito. Okaze de la fino de lia mandato ni metis al li kelkajn demandojn, kiujn li afable konsentis respondi.

**Vi prezidis la Esperantan Civiton, en la konstitucia ofico de Konsulo, dum la jarkvino 2007–2011. Kial vi ne rekandidatas al la konsuleco?**

Konsulo fariĝas la kandidato numero 1 de la listo kiu gajnas la baloton. La Verda Listo ĉefkandidatigis Walter Ŝelazny por 2002–2006, min por 2007–2011, Marie-France Conde Rey por 2012–2016. Ne havi ĉiam la saman gvidanton karakterizas la politikan kulturon de la Nova Maldekstro en Esperantio, kiu ne estas klasbatala, sed civilrajto-defenda. Mi multe ĝojus, se ni havus baldaŭ Konsulinon, interalie ĉar nek UEA nek SAT en sia tuta historio havis prezidantaron — la nova Esperantio ne povas esti masklisma.

**La ĉefaj atingoj de via konsuleco?**

Prefere ni diru de la dua parlamenta mandato, ĉar la laboron plenumis ne nur la gvidanto, sed ankaŭ la tuta ekzekutiva (Kapitulo) kaj leĝodona povoj (Parlamento), helpe de la stabo kaj de ĉiuj aktivuloj. Dum la unua mandato necesis kompletigi la normaron el la Pakto kaj el la Konstitucio: tial oni produktis pli da leĝoj, direktivoj kaj reglamentoj ol en la dua. Dum la nuna jarkvino ni zorgis precipe pri la kreo de la strukturaj kaj organizaj rimedoj: por diplomatie rilatadi (legacioj), por la financado (Fondumo Pro Esperanto), sed ankaŭ por la familia juro. La Parlamento, precipe la Senato, fortiĝis kaj spertiĝis; la Kapitulo same; ni formis diversajn kadrojn, laŭ reto de volontulaj buralistoj (anstataŭ salajrataj burokratoj). Konsekvence ni atingis sukcesojn en eksteraj rilatoj, ekzemple kun aliaj subjektoj de internacia juro, kiel la Kabinda Respubliko (Cabinda).

**Kio plej malkontentigis vin?**

La malrapideco en la evoluo de la Civita konfederacio, nome la malfacilaĵoj en la procezo de koherigo de la paktintaj establoj. Tio manifestiĝis precipe ĉe la establoj kies membraro nur minoritate praktikas raŭmisman metodon. La kvalita kresko de la kolektivoj ankoraŭ tro malfruas, kompare kun la kvalita kresko de la individuoj.

**Ekster la Civito, kio karakterizas la lastajn jarojn en Esperantujo?**

La definitiva kriziĝo de la finvenkismo, jam ekde 2001. Tion asertas ne nur la raŭmistoj, sed ankaŭ ĉiu ne raŭme

orientita historiisto, de Ziko Sikosek per *Esperanto sen mitoj* ĝis Humphrey Tonkin per *Lingvo kaj popolo*. Fakte la finvenkismaj strukturoj kaj servoj (unuaŭvice UEA kaj SAT) multe pli rapide regresas ol la raŭmismaj (nome la Esperanta Civito) progresas. Interalie, parto de nia progreso estas la transpreno de sociokulturaj agadterenoj kie la finvenkismo cedis aŭ eĉ fiaskis: verkistoj, feminismo, naturamikoj, kvalita kresko en Afriko... La krizo de identeco estas evidenta en la malnova Esperantio. Por SAT jam oni parolas pri agonio. Por UEA la sinkado daŭras pli longe, ĉar pli da individuoj estas sentimentale aŭ finance ligitaj al ĝi; sed eble ĝuste la lasta stadio pli rapidos ol por SAT.

**Sed interesaj aktivadoj ofte okazas ekster UEA kaj SAT. Ekzemple, temas pri la asocio E@I, pri la grupo kiu okupiĝas pri kino, pri la kompleksa agado en Herzberg, Poznano, Bjaliŝtoko, Tuluzo, pri la universitata instruado en Ĉinio... Finfine, la plej granda esperantista grupo estas ne UEA, sed la uzantaro de Lernu!**

La interesaj aktivadoj okazas precipe ekster UEA kaj preskaŭ ĉiam ekster SAT, nuntempe. Se ne temas pri raŭmistoj, mi distingus inter tri tendencoj. Unue, la entreprenoj, kiuj vivtenas sin per nia lingvo kaj ĝia uzantaro: *Sezonoj* en Ruslando, E@I en Slovakio, Edukado.net en Nederlando... ilin fincas parte la propra klientaro, parte Esperantic Studies Foundation; kaj tra tiuj ili ree gravitas ĉirkaŭ UEA (la kolosa debitejo de Esperantio), kvankam ili ne strebas aparte influi ĝin. Due venas la opoziciuloj kun propraj alternativaj strukturoj, kiel Martin Schäffer kun sia meksika fondumo, aŭ Lu Wunsch kun Esperantoland. Trie, la politikaj partioj: E-D-E, Unu Mondo, la radikaluloj de Marco Pannella (kaj Giorgio Pagano) — ĉi-lastajn UEA oficiale anatemis. Se tamen ili ĉiuj ne liberiĝos komplete de la finvenkisma pensmaniero, ilin reensuĉos ĝuste UEA.

**Kial la menciitaj opoziciuloj ne serĉas kunlaboron kun la Civito?**

“Opoziciuloj” estas de du tipoj: unuj opinias ke la strukturo estas ankoraŭ reformebla kaj savebla, aliaj jam ne plu. En la unua tipo situas esence finvenk-



istoj, do estas normale ke ili ne serĉas kunlaboron. Kontraŭe, ekzemple, en la Ruĝa Listo por la Civita Senato vi trovas homojn de la dua tipo, precipe la marksisme orientitajn (kaj la prezidanto kaj la sekretario de IKEK havas la esperantan civitanecan). Probable ili opinias ke la klasbatala esperantistaro havas futuron en la nova Esperantio, pli ol en SAT. Simile, la homoj de la dua tipo, jam rezignintaj pri la reformebla de UEA, rilatas pozitive kun la Esperanta Civito: ankaŭ la de vi menciita aktivulo. Aliflanke, ne kreu ke la Civito ekzistas por kolekti opoziciulojn al du mortontaj asocioj: ni laboras por, ne kontraŭ.

**Kiu estas la ĉefa problemoj de Esperantujo?**

Se temas pri la interhomaj rilatoj, la malsufiĉa kapablo krei empation kaj sinergiojn. Tio ne pliboniĝis per la enveno de interreto, eĉ male. La finvenkismaj strukturoj akcelas tiun malkapablon, alivorte forpuŝas homojn. En la raŭmismaj la konflikteco estas multe pli malgranda. Sed ankaŭ la Esperanta Civito devas fronti la defion krei empation kaj sinergiojn.

En tiu ĉi kunteksto gravas ankaŭ la manko de referencaj modeloj, nome nekontestablaj figuroj kiuj, eĉ se ne ĉiuj aprobas iliajn farojn, en la esperantomondo ŝajnas relative imitindaj dum sufiĉe longa periodo. Certe UEA kaj SAT ne havas plu tiajn admiratojn kia estis Privat aŭ Lapenna, antaŭ ol oni ponardis ilin ĉe la dorso aŭ ĉe la brusto...

**Kiu estas la recepto de la Esperanta Civito por eliri el la supre aluditaj krizoj kaj problemoj?**

La raŭmisma, kiun fakte nur la Esperanta Civito aplikas plene. *La Ondo de Esperanto* koncize priskribis ĝin en 1999, №5, legebla ankaŭ rete ĉe <http://esperanto.org/Ondo/H-silf55.htm>

## Kiujn konkretajn pladojn la Civito kuiris laŭ ĉi tiu recepto?

Tiujn, kiujn antaŭvidis la Pakto kaj la Konstitucia Ĉarto, laŭ la politika programo de la Verda Listo (iel analoga al la socialdemokrata plus la ekologiisma, se ni estus en Germanio), kiu gajnis la elektojn por la Senato en 2001 kaj en 2006. Kvankam mi devas emfazi ke ĉiuj gravaj decidoj estis alprenitaj ankaŭ kun la subteno de la opozicioj: la Blanka Listo ekde 2001 (iel analoga al la kristandemokrata) kaj ankaŭ la Ruĝa Listo ekde 2006 (iel analoga al Linke / [ekstrema] maldekstro).

Interne, ni perfektigis la strukturon, aprobante la necesajn normarojn pri la Civitana Registro, la balotoj, la legacioj, la referendumo, la Civita banko, la mutuala rabata sistemo ktp. Krome ni alprenis decidojn pri specifaj temoj, ekzemple la simbolo uzenda por la unua helpo: la Senato aprobis la ruĝan kristalon anstataŭ la ruĝa kruco (sen la apogo de la Blanka opozicio); aŭ la familia juro, kiu inkluzivas interalie la manieron nomi sin en Esperantio (ĉu antaŭnomo aŭ postnomo?). Ĉio ĉi demonstras ke eblas alternativa maniero organizi Esperantion. Specife pri la lingvo, estis kreita la Lingva Komitato (kiu celas respondi al lingvaj demandoj el la Civitaj instancoj), estis lanĉita la Internacia Semajno de la Esperanto-Biblioteko, estis organizita la LingvoTesta Sistemo de la Esperanta Civito, la sola kiu aplikas al esperanto ĉiujn ses nivelojn de la Komuna Eŭropa Framo de Referenco. Rilate al la paktintaj establoj, ni laboris por plibonigi la nmoveblaĵojn en proprieto de niaj paktintoj, kaj por doti ĉiujn establojn per propra domo: tio plene sukcesis por KCE kaj LF-koop, estas realigata por SIPU en Afriko kaj por ENa en Hispanio, ne sukcesis por FEM kaj PEN.

Ĉe la eksteraj rilatoj, la Pakto sendube propulsis la aktivecon en literaturistaj medioj, kies pivoto estas Esperanta PEN-Centro; difinis la rolon de KCE kiel ĉefa lingvotesta centro, en rilato kun la Asocio de LingvoTestistoj Eŭropaj; revivigis la naturamikan esperanto-movadon; helpis al la vigliĝo de feminisma movado. Rilatoj estis establitaj ankaŭ kun Monda Socia Forumo, mondialismaj organizoj, la Organizo de Nereprezentataj Popoloj (UNPO): en ĉilasta ni renkontis la kabindanojn, kiuj inspiris sin al nia konstitucio por verki la propran, de la Kabinda Respubliko.

**Temas plejparte pri laboro organizata kaj ekstera, sed malpli pri servoj al la esperantistaro, kiujn ofertas la**

**tradicia movado kun riĉa elekto de kongresoj, renkontiĝoj, fakaj konferencoj, ekskursoj, vojaĝoj, delegitoj, festivaloj kaj staĝoj en pluraj landoj kaj mondregionoj; kaj ankaŭ libroj, gazetoj, retforumoj, retejoj ktp. Kion la Civito ofertas al siaj membroj?**

La alternativeco de la nova Esperantio situas ankaŭ en la fakto, ke nia konsorcio devas esti subsidua al la paktintoj. Tio kongruas kun federismo, kiun la Esperanta Civito aplikas pro la raŭma metodo, male al la centralisma filozofio de la finvenkismaj asocioj. Konsekvence, la Kapitulo ne iniciatas mem, sed stimulas, helpas, kunordigas la iniciatojn de la paktintoj. Tio estas deduktebla jam el mia antaŭa respondo. La Esperanta Civito ne anstataŭas paktintajn eldonejojn por produkti librojn aŭ gazetojn, nek paktintan lernejon por fari kursojn aŭ organizi lingvotestajn sesiojn. Ni ne konas la paradokson de UEA, kiu lanĉas novan ekzamenaron konkurence al sia propra aliĝinta asocio ILEI! Aliflanke, ekzistas servoj efektive Civitaj, kiel la mikrokredita servo ĉe Fondumo Pro Esperanto, aŭ la rabatoj pro direktivo Hiltbrand (tial, ekzemple, en Ruslando vi pagas duone la abonojn al *Literatura Foiro*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Femina*, se vi havas la esperantan civitanecon), aŭ la ĵus aprobita Tempo-Banko, kiu funkcias ekde 2012.

**En via antaŭa intervjuo (LOdE, 2003, №2) vi skribis: “Mi ĝojus, se almenaŭ la Esperanta Civito stimulus la ekeston de revuoj en gravaj, pluraciaj idiomoj, redaktataj de Esperantianoj, kiuj okupiĝus pri ĉiuj aspektoj de planlingvistiko, unuavice esperantologio, sed ankaŭ lingva inventado, literaturaj planlingvoj, piĝinismoj kaj**

**kreolismoj, sekretaj kaj sanktaj lingvoj, kontaktologio ktp”. Ĉu intertempe okazis provoj en ĉi tiu sfero, kiuj ĝojigus vin, aŭ nur *Language Problems and Language Planning* plu plenumos tiun rolon?**

Jes, ekzemple en Italio, kaj ne nur lige kun nia paktinta establo Itala Interlingvistika Centro. Sed mi opinias nun, ke estus pli oportune akiri spacon en jam ekzistantaj revuoj: ekzemple persvadi la redakcion de trilingva (angla, franca, hispana) renoma literatura revuo dediĉi numeron al la literaturoj en inventita (esperanto), piĝina (Tok Pisin) kaj kreola lingvoj (ladino), havante esperantlingvajn fakulojn kiuj kapablas redakti tiun numeron.

**Post la decembra baloto vi ne plu devos plenumi la konsulajn devojn, kaj do ricevos iom da tempo por aliaj aferoj. Kion vi planas fari?**

Kadre de la Esperanta Civito probable mi gardos du oficojn: senatano (se reelektita de la esperanta popolo) kaj prezidanto de Fondumo Pro Esperanto (se renomumita de la nova Kapitulo). Mi dediĉos min precipe al la financado de la nova Esperantio. Ekster tio, mi verkos kaj vojaĝos, ofte partoprenante en neesperantistaj internaciaj kongresoj.

**Ĉu vi kredas ebla tion, ke simile al Vladimir Putin, kiu post unuperioda “ripozo” rekandidatiĝos por la posteno de la prezidanto de Ruslando (en Esperantujo oni konas la ekzemplojn de Stettler kaj Tonkin en UEA), kaj rekandidatos por 2017–2021?**

La Konstitucio ne malpermesas rekandidatiĝojn al la konsuleco, sed nek la Verda Listo proponos nek mi akceptos tion. Nia demokratio ne bezonas dumvivajn prezidantojn.

Afrikaj kadroj de la Esperanta Civito trejnataj de Giorgio Silfer en Bujumburo: en la unua plano Martin Mbazumutima, kandidato al la Civita Senato en 2011. (© LF-koop)



## AIS fronte al problemoj

La 32a Sanmarineca Universitata Sesio (SUS 32) de la Akademio Internacia de Sciencoj San-Marino (AIS), okazis 24 sep – 1 okt 2011 en la Rumania distrikta ĉefurbo Sibio (Sibiu).

SUS 32 okazis laŭ invito de Universitato Lucian Blaga de Sibio (ULBS) en la konstruaĵo de ties departemento pri evangelia teologio. La lokan organizadon transprenis tre sukcese EProf. Sara Konnerth, kiu dum la sesio adapte adoptigis sian doktorecon.

La inaŭguro okazis en la aŭlo de la departemento, kun partopreno de profesoroj el Sibio kaj Bukareŝto, interalie prof. Tobler, estro de la teologia departemento, kaj prof Hudițeanu, kiu en sia parolado emfazis la multjaran tradicion de la kunlaboro inter AIS kaj ULBS.

Jam antaŭ la sesio la senato de AIS esprimis sian zorgon, ke dum la pasinta senatperiodo (2008–2011) ne troviĝis novaj fortoj por la administra laboro de AIS. Tiu temo estis diskutata ankaŭ ekster AIS en la Esperanto-movado, ĉar Esperanto ja estas la precipa labora kaj administra lingvo de AIS.

Nova senato de AIS, elektenda dum SUS 32, estis trovebla nur per tio, ke du ĝisnunaj vicsejatoj transiris en la “kernan” senaton kun kvin membroj. Ili estos (de 2012 al 2015, alfabeto sinsekvo): Reinhard Fössmeier (Germanio), Hans Michael Maitzen (Aŭstrio), Eva Poláková (Slovakio), Hans Dietrich Quednau (Germanio), Bengt-Arne Wickström (Svedio/Aŭstrio/Germanio).


Ĉar ne ĉiuj elektitoj povis ĉeesti en SUS 32, la elekto (fare de la senato mem) de nova prezidanto estis prokrastita. Ĝi okazos ĝis la fino de 2011.

La estonteco de AIS estis ankaŭ la temo de la Akademia Forumo. Tiu ĉi kontraŭis proponojn, ke AIS reduktu siajn instruajn kaj ekzamenadajn aktivadojn al iom da distanca instruado, se tio estas iel evitebla.

Je la fina tago okazis laŭtradicie la studfinaj ekzamenoj. Per “adapta adopto” (= re-ekzameno de grado akirita de alia institucio) doktoriĝis ĉe AIS Sara Konnerth (Sibiu-Hermannstadt, Rumanio) kaj Zlatko Hinšt (Zagrebo, Kroatio).

Dum SUS 32 okazis ankaŭ kursfina ekzameno por ULBS-studentoj, kiuj en marto partoprenis kurson de AIS-docento. En la post-SUS-a semajno okazis plia kurso de AIS-docento por ULBS-studentoj.

Reinhard Fössmeier



## TEJO: Freŝa erao komenciĝis

La estrara teamo, kiu elektigis en la ĉi-somera IJK en Ukrainio kaj kiu gvidos TEJO-n en la proksimaj du jaroj (2011–2013), okazigis sian unuan kunsidon 2–4 sep en la Centra Oficejo en Roterdamo.

Ĉiuj estraranoj kaj la du volontuloj (finanta Manuela Ronco, komencanta Sébastien Denux), venis plenplenaj je emocioj post somero riĉa je eventoj. Cetere, kelkaj el ili pluveturis al Bruselo post la kunsido por reprezenti TEJO-n en la foiro *Volontula Vilaĝo* organizita de la Forumo Junulara Eŭropa.

Kiel kutime, ne mankis temoj atentantaj decidon. Unuavice, tamen, la estraro definitivigis siajn planojn por la proksima jaro.

**Kontakto.** La redaktoro de *Kontakto*, Rogener Pavinski, okaze de la kunsido sendis kelkajn proponojn pri kiel informi novajn kaj jamajn legantojn pri la refreŝigita revuo. Sekve de la diskuto oni decidis lanĉi abonigo-kampanjon kun premioj; detalojn atendu baldaŭ. Krome, ekzempleron de *Kontakto*, kiel oficialan revuon de TEJO (pro la rubriko TEJO-Tutmonde), ekde nun ricevos ĉiuj landaj sekcioj kaj ĝi povus esti uzata por lokaj varbo-celoj.

**Regularo kaj Reglamentej.** Dum la Komitata kunveno en Kievo okazis laborgrupo kaj estis prezentita unua malneto de la proponata ŝanĝaro al la difinaj dokumentoj de TEJO. Nun, helpe de Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro, certaj proponoj (ekzemple mallongigo de oficperiodo al unu jaro, aldono de membra kategorio por ideoj subtenantoj, sumlimo por financaj kontraktoj) estis pliprecizigitaj kaj ilia



senco analizita. Post revortumado kaj ordigo la dokumento estos prezentita al la Komitato por esprimi opiniojn kaj eventuale aprobi. La diskuto pri la regularo/reglamentej partoprenis ankaŭ Paweł Fischer-Kotowski, gvidanto de la koncerna komisiono, kiu nuntempe staĝas en Biblioteko Hodler.

**Dungo de oficisto.** Dum la kunsido estis findifinitaj ĉiuj restantaj demandoj pri la laboro de (ekster-oficeja) dungito, kaj sekve subskribita la kontrakto kun Manuela Ronco, kiu eklaboros la 3-an de oktobro. Gratulon al TEJO kies plujaraj streboj finfine efektiviĝis!

**Retpaĝaro de TEJO.** La nuntempa retejo iom-po-iom kaosiĝis, ne plu havas optimumam aranĝon kaj necesas restrukturi ĝin; tiun laboron komencis Saša Kovjazina, antaŭa estrarano pri informado, kaj ĝi estos daŭrigata helpe de profesia persono nun serĉata. Krome, ni kunlaboros kun niaj Landaj Sekcioj gvide de Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado, por helpi al ili aperigi siajn aranĝojn en komuna kalendaro. Ĝi estos konsultebla ankaŭ ĉe tejo.org.

**Kunlaboro kun ILEI.** ILEI proponis okazigon de sia konferenco en 2014 apud la IJK en iu afrika lando (pri kiu okupiĝas tiucela komisiono, gvidata de Hara Subašić). Diskutante pri tiu ĉi bona propono ni ankaŭ atentis la temon de trejnado de instruistoj dum junularaj aranĝoj kaj interrete per edukado.net. Ni plutraktos kun ILEI ambaŭ aferojn. Cetere, ĉi-kuntekste oni interkonsentis pri rabato al junuloj prenantaj KER-ekzamenon C1.

**Informado kaj kulturo.** Estraranoj ankaŭ preparolis kolektadon de film-materialoj kaj bonkvalitaj fotoj el diversaj aranĝoj, por posta uzo informcele. Ni decidis prepari foto-konkurson kadre de *Kontakto* kaj refreŝigi la Artistan datumbazon kreitan siatempe de David-Emil Wickström. Por teni bonajn kontaktojn kun amaskomunikiloj ni ekserĉas komisiiton; ĉu vi interesiĝas pri monda ĵurnalismo? — kandidatiĝu! Krome ni preparolis kunlaboron kun Muzaiko — interalie tuj registrante sonan kontribuon por ĝi.

La tuta kunsido fulmrapide pasis en tre bona etoso kaj rezultigis ampleksajn tasko-listojn por ĉiuj. Kio signifas ke agado en TEJO ne mankas!

## La Estraro de TEJO

Roterdamo: Estraranoj kaj volontuloj de TEJO kunsidis (kaj kunstaris, en la apuda foto) en bona etoso (*La foto kaj la teksto estas prenita el la retejo tejo.org*)

## UAM: Nova grupo kaj ekzamenoj

17 sep la kvinan fojon komencis siajn trijarajn studojn nova grupo ĉe la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando).

La partoprenantojn el dek landoj salutis la vicdekano de la Novfilologia Fakultato, prof. Jerzy Kaliszan. Li emfazis la unikecon de la interlingvistikaj studoj, bone instalitaj en la Novfilologia Fakultato, kaj la ĝojon, ke ĝi altiras partoprenantojn el diversaj landoj. La gvidantino de la Studoj, prof. Ilona Koutny bonvenigis la partoprenantojn skizante la 13-jaran historion de la Studoj kaj la sekvantajn kursojn kaj taskojn. La studoj povis starti dank' al la stipendioj de ESF kaj de ILEI-UEA, nu, kaj al la entuziasmo de la partoprenantoj, speciale de la brazila grupo.

La 20 kursanoj (kvin el Brazilo, po tri el Hungario, Pollando kaj Svislando, po unu el Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Ruslando kaj Usono) konsistas plejparte el junuloj, sed ne mankas spertaj esperantistoj. Ili partoprenis dum la sekvaj kvar tagoj en kvar kursoj.

Prof. John Wells prezentis kun verbo diversajn sonsistemojn en la mondo kaj pli detale la fonetikon de Esperanto.

Prof. Vera Barandovská-Frank traktis interlingvistikon: de la tereno de interlingvistiko kaj internacia lingvosituacio tra la etnaj interlingvoj kaj piĝinoj ĝis planlingvoj.



Poznano: Profesoro Jerzy Kaliszan salutparolas en la malfermo de starta sesio de la nova grupo de la Interlingvistikaj Studoj. (Fotis Stefano Keller)

Prof. Aleksander Melnikov diskutis la nocion kulturo kaj speciale la terenojn de Esperanto-kulturo, analizis la fonajn sciojn de tipa esperantisto.

Lidia Ligeza pliproksimigis la poezion kaj Tomasz Chmielik la prozon de la unua periodo de la Esperanta literaturo al la ĉeestantoj.

Paralele al la sesio okazis ekzamenoj de kvar gestudentoj finintaj la trijaran studadon kaj de dek partoprenantoj de la unujara instruista trejnado (komuna entrepreno de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj de ILEI kun la kontribuo de Edukado.net).

## Profesorino Koutny premiita pro interlingvistika agado



Ilona Koutny, posteulo de profesoro Szerdahelyi kaj iama instruisto en la Esperanto-fako de ELTE (Eötvös Universitato, Budapeŝto), fondinto kaj gvidanto dum 13 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznano), la 27an de septembro 2011 ricevis premion de la rektoro de UAM pro sia plurjara organiza kaj didaktika laboro por la Interlingvistikaj Studoj.

La premio estis donita al ŝi la 27an de septembro 2011 dum la festa kunveno tuj post la fino de la starta sesio de la nova grupo de la Interlingvistikaj Studoj.

En julio d-rino Koutny estis nomumita profesoro de UAM, kie ŝi antaŭ du jaroj iĝis estro de la Ugra-Finna Katedro. Tiu ĉi rangaltigo kaj premio kontribuas al la firma pozicio de interlingvistiko en UAM. La vicdekano, prof. Kaliszan dum la inaŭguro de la nova interlingvistika grupo kaj de la sekva Interlingvistika Simpozio, tie ankaŭ la vicedirektoro de la Lingvistika Instituto, prof. Zabrocki, kaj dum la bankedo la dekanino, prof. Tomasziewicz, emfazis la gravecon de la interlingvistikaj studoj en la Novfilologia Fakultato kaj laŭdis la iniciaton de Ilona Koutny.

La redakcio de *La Ondo* aliĝas al la laŭdoj kaj gratuloj kaj deziras al Ilona Koutny, proklamita kiel la Esperantisto de la jaro 2008, pliajn sukcesojn kaj atingojn en la grava laboro, kiun ŝi plenumas en UAM.

En la unua grupo defendis sian laboraĵon kaj respondis al la demandoj de la ekzamenkomisiono: Marija Jerković (kroataj lernolibroj de Esperanto kaj iliaj verkistoj), Tea Radovanović (tradukita kroata literaturo al Esperanto), Sean Healy (maŝina tradukado kaj Esperanto), Petro Balaž (moderna informado kaj DVD kreita ĉe E@D): ĉiuj stipendiitoj de ESF.

La alia grupo (Magdalena Feifichová, Ildikó Joóné Ladányi, Gisela Macioszek, Arlette kaj Edmond Plutniak, Gizela Sklorz, Svetlana Smetanina, Petra Smidéliusz, Margaretha Symoens, Szabolcs Szilva) krom sia pli mallonga kaj praktika laboraĵo devis ekzameniĝi pri gramatiko, literaturo kaj movado de Esperanto por akiri la instrurajtigon de ILEI. Pluraj analizis lernmaterialojn kun la gvido de d-rino Katalin Kováts. Flanke de ILEI partoprenis la ekzamenojn Zsófia Kóródy. La laboraĵoj estas konsulteblaj ĉe [Edukado.net](http://Edukado.net).

**Ilona Koutny**

## Interlingvistika Simpozio en UAM

La interlingvistikan sesion sekvis Interlingvistika Simpozio (22–23 sep 2011) *Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defioj de la 21a jarcento* en la Novfilologia Fakultato, organizita la duan fojon (la antaŭa okazis dum la dekjarigo de la Studoj en 2008).

Partoprenis ĝin kvindekda homoj el 15 landoj: novaj kaj malnovaj gestudentoj, alvenintaj instruistoj kaj kelkaj aliaj. Dum la malfermo kaj la vicdekano de la Novfilologia Fakultato kaj la vicedirektoro de la Lingvistika Instituto emfazis la gravan kaj prestiĝan rolon de interlingvistiko en la scienca vivo de la fakultato, dankis la organizan laboron de la iniciatinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, prof. Ilona Koutny.

La dudeko da prelegoj okazis en kvar sekcioj: lingvistiko, metodiko, movado kaj literaturo. Fine de ĉiuj sekcioj okazis diskutoj pri la defioj al la donita tereno. Kelkaj ekzemploj el la programo: translingvigi kulturaĵojn en Esperanton (A. Melnikov), Globish (M. Farris), ekstermovadaj kunlaboraĵoj (Zs. Kóródy), RITE: Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net (K. Kováts), lingvopolitiko de UEA ĉe UN (S. Keller), atendoj de esperantistaro por UEA (Z. Galor), la Esperanta literaturo sojle de la 21a jarcento — kien, kiel kaj por kiu? (T. Chmielik).

**Ilona Koutny**



Aktoroj, lernantoj el bjalistoka liceo post la prezento de la spektaklo *Kato Koloro* en Arkones (Fotis Joanna Filipowicz-Choroszuca)

## Arkones — tradicie moderna

23–25 sep en la fervojista domo de la Pollanda urbo Poznano okazis Arkones — Artaj Konfrontoj en Esperanto. La programon plenigis trideko da prelegoj kaj prezentaĵoj — libreprezentoj, prelegoj pri historio, lingvo kaj amasinformado, kunvenoj primovadaj kaj aliaj.

Konforme al la nomo de la aranĝo valoras koncentriĝi pri la artaj programeroj, kiuj ne elrevigis.

La muzikan parton, precipe vesperan, ĉefe efektivigis artistoj partoprenantaj en Arkones de jaroj.

Dum la malfermo koncertis elektromusikistoj Solotronik kiu neordinare interpretis *La Esperon*. Viglajn polajn kanzonojn gitarludis kaj kantis Zuzanna Kornicka, kaj kantojn diverslandajn — Anjo Amika.

Radosław Nowakowski el la muzikbando *Osjan* hipnotigis la aŭskultantaron pere de *Monodrumo*, elserĉante el diversgrandecaj tamburoj sian miraklan, buntan historion. Libro-instalaĵo de la laste menciita aŭtoro dekoris la ĉefan salonon kaj konsistis el interesaj bildtekstoj, eksterordinare binditaj kaj presitaj libroj. Dum la noktoj dancejen invitadis Aleksej Korĵenkov.

Tri teatraj programeroj trovis siajn lokojn dum ĉi tiu semajnfino. Nemaleblis estis la spektaklo *AL, SUB, APUDE* de la svedo Jarlo Martelmonto, kiu kun helpo de du bravuloj prezentiĝis per vortoj kaj koloraj dekoraĵoj. Kelkajn amuzajn unuaktajn spektakletojn baze de rakontoj de Ĉeĥov kaj Gogol preparis la teatro *Improvizo* el Jalto (Ukrainio).

Kaj junulara teatra grupo el Bjalistoko ludis spektaklan version de la libro *Kato-Koloro*, porinfana fabelo eldonita en kvar lingvoj antaŭ unu jaro.

Danke al juna hungaro Szabolcs Szilva ĉiuj vizitantoj de la aranĝo povis baze lerni la lingvon internacian dum lia tritaga kurso. Zsófia Kóródy, Ilona Koutny kaj Katalin Kováts en solena etoso enmanigadis diplomojn kaj gratulis al ĉiuj, kiuj finis aŭ komencis ĉi-jare la interlingvistikajn studojn kaj la instruistan trejnadon ĉe la Universitato Adam Mickiewicz.

Tradicie okazis miel-vespero kun medo-regalo kaj ĉe apuda lago estis komuna fotado. Spekteblis la filmoj *The Universal Language* de Sam Green, *Polaj spuroj* de Rogener Pavinski kaj *Japana printempo* de Roman Dobrzyński.

Listigo de la programeroj ne sufiĉas por priskribi la aranĝon. Tiuj, kiuj ĝin ne partoprenis kredu, ke ĝia tradicio (Arkones okazis jam 27-foje!), kultura etoso kaj originala, modernarta programo kaŭzas, ke pluraj homoj trovas tiun ĉi eventon la plej altkvalita en la Pollanda Esperanto-movado. Kaj ĉio danke al la Poznanaj organizantoj, precipe Paweł Janowczyk kaj Tobiasz Kaźmierski — ilia superhoma laboro por fari Arkoneson laŭeble bona meritas ĉies laŭtan aplaŭdon kaj partoprenon venontjare!

**Przemysław Wierzbowski**

**Ne forgesu  
(re)aboni**

## Esperantistoj gaste ĉe gliro

En la regiono, kie la fratoj Grimm antaŭ pli ol cent jaroj kolektis fabelojn, troviĝas la urbo Marburg, en kies Naturamika Kabano loĝas gliro. La kabano situas en arbaro, sed tamen nur kelkcent metrojn for de bushaltejo. Tie fine de aŭgusto renkontiĝis esperantistoj, inter kiuj estis sep infanoj, por ludi, krei kaj sperti. Precipe por la grandurbanoj tre impresa estis la sperto de la naturo ĉirkaŭ la kabano. “Imagu, — skribis Ivanka per mesaĝeto al amikino, — ĉi tie ankaŭ estas sciuroj!” Jes, ili saltis sur la trunkoj kaj branĉoj de la arboj kaj sciroleme rigardis, kio tie okazas ene de tiu arbora domo. Multaj birdoj kantis dum la tuta tago. Kaj nokte foje ekstere en lumo vespertoj iĝis videblaj.

La naturon ni utiligis por longaj promenadoj, kiujn ni spicumis per serĉado de geo-kaŝejoj — entute ni malkaŝis kvar. Post la trovado la grupo kolektiĝis ĉirkaŭ la trovitaĵo por komune ekvidi, kio estis en la trovita ujo. Ankaŭ al la urbo ni promenadis, kie nin impresis la kastelo kaj la mezepokeca urbocentro kun multaj trabfakaj domoj el kiuj multaj belege estas ornamitaj. Ĉe la kastelo ni vizitis senluman kameron (camera obscura), kie oni projekcias bildon de ekstere per spegulo kaj lenso sur blankan tabulon en la mezo de la kamero. Okazis manlaboroj de Betti pri ornamado de bildoj per felto kaj lano. Knabina grupo pretigis el fotoj kaj registritaj scenoj ĉarman filmon pri la ĉi-jara Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo — KISO.

Kolektinte lignon en la arbaro ni kolektiĝis vespere ĉirkaŭ fajro, kante, bakante bastonpanon kaj rostante diversajn aĵojn en la ardo. La infanoj per la kantado transdonis iom da REF-etoso al la vespero.

En la granda salono ni havis agrablan lokon por ludi diversajn tabul- kaj kartludojn. Plej fervore estis luditaj “Scotland Yard”, en kiu grupo devas kubjetante kapti krimulon, “la freneza respektive ŝovita labirinto”, en kiu daŭre ŝanĝiĝas la irvojoj. Al mi ĉi-foje plej plaĉis “Dixit”, divenludo, en kiu oni kombinas nekutimajn bildojn kun vorto, frazo aŭ diraĵo.

La bona etoso estigis dezirojn al rea KISO-okazigo venontjare. Por tio ni rezervis la kabanon por 20–26 aŭg 2012. Pliajn informojn vi baldaŭ trovos en la reto ĉe [www.esperanto.de/KISO](http://www.esperanto.de/KISO).

**Gunter Neue**



La migrogrupo de EMA sur la roko de Loreley. La organizanto Wolfgang Bohr staras en la mezo, kun flago.

## Somera festo de EABB

27 aŭg anoj de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio venis al la fama monaĥejo de Kloster Zinna (parto de la urbo Jüterbog). Tie nin surprizis ĵurnalistino de la regiona gazeto *Märkische Allgemeine*. La eta grupo respondis la demandojn de la ĵurnalistino, kaj intertempe la grupeto kreskis.

En la muzeo ni informiĝis pri la vivo de la monaĥoj kaj la speciala ekspozicio pri mezepoka parlamento — la princa tago. Kulmino estis la vizito de la brandfarejo, kie oni povis gustumi kaj aĉeti la mondfaman *Klostran fraton*. En la granda preĝejo de la monaĥejo, kie la gvidantino klarigis la diversajn simbolojn kaj skulptaĵojn en la granda preĝeja halo.

Poste ni veturis al la ĉefa celo: la ĝardeno kaj domo de la familio Langer. Same kiel pasintjare, la gastiganta familio regalis nin per bongustaĵoj kaj trinkaĵoj. Ni multe babilis kaj diskutis pri diversaj temoj. Fine, kunvenis tie dudeko da esperantistoj. Nur malfruvespere ni devis adiaŭi la familion Langer por veturi al Berlino por la lasta trajno.

Denove multan dankon al ili pro ĉio.

**Ronald Schindler**

## Esperantista Migrado Aŭtuna

La 1a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA) arigis 2–7 okt ĉe Rejno partoprenantojn el Svislando, Francujo kaj Germanujo. Gaja etoso regis inter la pliaĝuloj, kiuj estis la ĉefa celgrupo de tiu nova aranĝo de Germana Esperanto-Asocio.

Post sufiĉe streĉa marŝado kaj grimpado, vespere dorlotis la komforta hotelo, kaj ekde la dua tago la kelnero jam fervore lernis Esperanton. La grupo vizitis, interalie, la faman doganan burgeton

Kaiserpfalz sur Rejn-insulo antaŭ Kaub, kie haveblis dupaĝa gvidilo ankaŭ en Esperanto. Sur la fama roko Loreley la grupo prezentis la Esperantan version de la samtitola poemo de Heinrich Heine.

La ĉeforganizanto Wolfgang Bohr anoncis la 2an EMAn por la venonta jaro denove apud Rejno, aŭ apud Mozelo. Maksimuma nombro de partoprenantoj estu 30 por konservi la amikaran etoson.

**Rudolf Fischer**

## EKOTUR jubileis

La ekoturisma renkontiĝo la unuan fojon okazis en Doksy 2001 sub la nomo IBIRE (Internacia Biciklista Renkontiĝo). Poste ĝi estis ofertita ankaŭ al piedturistoj kaj ŝanĝis la nomon al EKOTUR. Ĉi-jare ĝi okazis 11–18 sep en Dobříchovice apud Prago kun dudeko da ekoturistoj el Ĉeĥio, Germanio, Francio kaj Finnlando.

Oni dumtage moviĝis senmotore kaj ĝuis la belan naturon de la montetaro Brdy kaj Moravia Karsto. Biciklantoj sub la gvido de Miloš Bloudek, piedirantojn gvidis mi mem. Vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj, diskutoj, amuziĝo.

Okazis du libroprezentoj: Hannes Larsson dimanĉe prezentis sian anglan libron *Cross-Country Skiing around The World* (Skiado tra la mondo) kun ĉapitro pri Esperanto, kaj merkrede okazis bapto de la kvinlibra ekoturisma poŝvortaro, kiun ĉeestis la ĉefaŭtoro Zdeněk Pluhař kaj unu el la pluaj tri aŭtoroj Manfred Westermayer.

Kiel organizanto, mi anoncis, ke mi ne plu povos daŭrigi la tradicion kaj strebas trovi daŭriganton. Aperis espero, ke venontjare okazos EKOTUR en nova mantelo kun novaj organizantoj Miloš kaj Lenka Bloudek en Karlovy Vary.

**Petr Chrdle**

## Lingvolimo: Ŝanco por Esperanto

Proksimume inter Bazelo kaj Karlsruhe, Rejno estas limo inter Francio kaj Germanio. Geografie Rejno estas simetria akso inter la pejzaĝoj oriente kaj okcidente de ĝi, la Rejnebenaĵo ambaŭflanke de la rivero kaj du montaroj spegulas unu la alian, la Nigra Arbaro en Germanio kaj Vogejoj en Francio.

Esperantoparolantoj ambaŭflanke de la lingvolima rivero bone konas unu la aliajn, ĉar dufoje ĉiujare ili komune *staĝas*, kiel diras la francoj, respektive *seminarias*, kiel diras la germanoj, alterne: foje en Francio, foje en Germanio. Temas pri semajnfinaj aranĝoj kun Esperanto-kursoj de porkomencanta ĝis porperfekta niveloj, distraj, kulturaj kaj turismaj elementoj inkluzive.

En aprilo 2011 la orient-francaj limproksimumoj invitis la Esperanto-amikaron el la regiono en la feriocentron Le Vic en la sudaj Vogejoj interalie por komune serĉi sovaĝajn manĝeblajn herbojn kaj regali la staĝantojn per el ili preparitaj delicaj panŝmirajoj kaj salatoj. Lernado, prelego pri Albanio kaj distrado alternis; turisma ekskurso al la rava pejzaĝo kun vizito de loka metiejo. kaj rava muziko de la blinda franca kantisto FaMo ĝojigis la partoprenantojn.

16–18 sept 2011 la sudokcidentgermanaj Esperanto-amikoj el Baden-Württemberg invitis al “Lernfest”. Ĝi kombinis formalan lernadon kun neformala. Apartan akcenton donis al la okazaĵo la agrabla-festeca programo kun majstra pupteatro de Christoph Frank, amuziĝo per tabloludoj, turismaj kaj distraj elementoj. La festa-distra parto estis agrabla komplemento por la streĉa-celorientita lingvolernado kun Marek Blahuš el Ĉeĥio, Johannes Mueller el Germanio, André Grossmann el Francio, Alois Eder el Germanio kaj Christoph Frank el Germanio.

Lingvolima regiono estas ŝanco por Esperanto. Novuloj pli kaj pli ekscias pri Esperanto per la interreto, trovas *Lernu!* por lerni la lingvon kaj poste serĉas praktikejon. En la “Lernfest” komencantoj el regionaj kluboj kaj komencantoj el *Lernu!*, kiuj loĝas proksime, povas sen longa alveturado, kvazaŭ hejme, travivi la “Esperanto-mondon” kun internacia etoso kaj instigo al praktikado de sia novakirita lingvosocio.

Estas multaj lingvolimoj en la mondo. Dum ili disigas la diversajn gepatrajn lingvojn, ili estas ŝancoj por Esperanto, la interlingvo.

**Alois Eder**



## Japanio kaj Koreio kunkongresis

7–9 okt okazis Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en la urbo Seongnam apud Seulo (Koreio), por kio kunlaboris Korea Esperanto-Asocio kaj Japana Esperanto-Instituto. En ĝi estis kombinitaj la 43a Korea Kongreso de Esperanto, la 98a Japana Esperanto-Kongreso, kaj ankaŭ la 30a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea Junularoj.

Aliĝis 147 personoj el Koreio, 339 el Japanio, kaj 11 el Ĉinio, Ruslando kaj aliaj landoj — sume 497 aliĝintoj, el kiuj reale partoprenis 319 homoj. Krome, la Komunan Seminarion partoprenis 42 junuloj el sep landoj.

Prof. Ma Youngtae kaj Yamasita Tosihiko faris festoparolojn en la malferma soleno. Kadre de la Komuna Kongreso realiĝis kvin prelegoj kaj 27 fakaj kunsidoj, kaj la partoprenantoj ĝuis buntajn programerojn inkluzive de la interkona kaj festa vesperoj. KEA aranĝis ankaŭ duontagajn kaj postkongresan ekskursojn.

La Komuna Kongreso estis provprojekto inter la du aziaj landoj, kiu ne efektiviĝis sukcese sen fervora preparado de korea LKK. La kongreso vere utilis por lerni reciproke kaj profundigis amikecon inter koreaj kaj japanaj esperantistoj.

**Syôzi Keiko**

## ĈEA kun novaj estraro kaj statuto

La 13a kongreso de Ĉeĥa Esperanto Asocio okazis 7–9 okt 2011 en la bela pitoreska nordmoravia urbo Šumperk en Ĉeĥio. Entute partoprenis pli ol 70 kongresanoj, kaj ili elektis novan estraron de la asocio por 2011–2014: Vladimír Dvořák (prezidanto), Libuše Hýblová (vicprezidantino), Libuše Dvořáková (vicprezidantino), Vratislav Hirš (kaskisto). Pavla Dvořáková, Miroslav Malovec, Miroslav Hruška (membroj).

La kongreso post longa diskutado ŝanĝis la statuton de la asocio tiel, ke ĝi respegulu novajn kondiĉojn post la jaro 2002, kiam ni laste ŝanĝis la statuton. De tiam ne nur ĉeĥaj leĝoj ŝanĝiĝis, sed rapide disvolviĝis ankaŭ la socio kaj teknikaj eblecoj de komunikado.

La kongreso de ĈEA okazas ĉiun trian jaron, intertempe ni organizas konferencojn. La venonta okazos aŭtune 2012 kaj ĝi estos komuna kun la Esperanto-asocioj el Slovakio kaj Aŭstrio.

**Jiří Tomeček**

## Meksiko: Kongreso de rekordoj

16–18 sep 2011 okazis en Guadalajara la 11a Meksika Esperanto-Kongreso. Temis pri kongreso de rekordoj. Kun 45 partoprenantoj el kvar landoj ĝi estas inter la plej internaciaj kaj inter plej grandaj Meksikaj Esperanto-kongresoj.

Elstaraj gastoj akompanis nin: Duncan Charters (ILEI-vicprezidanto, Usono), Georgo Handzlik (muzikisto kaj aktoro el Pollando) kaj Jean-Marc Lecercq (JoMo, muzikisto el Francio). La partoprenantoj povis sekvi bonkvalitajn prelegojn, kiuj rilatis al la kongresa temo: “La instruado de Esperanto en Meksiko; malfacilaĵoj, defioj kaj proponoj”, ekzemple “Instruado de Esperanto en Meksiko” de Daniel Moreno, “Lerni Esperanton por lerni aliajn lingvojn” de Juan Mario Morales de la Torre aŭ “Planado kaj organizado de kursoj” de Edgar Noel López Borja. Duncan Charters prezentis ege interesan temon “Modernaj teknologioj por Esperanto-lernado”.

Grava temo ankaŭ estis la informado pri Esperanto. En la koncerna laborgrupo ni baze eksciis, kial entute gravas informi pri Esperanto kaj kiel plej taŭge fari tion. Nur per informado ekestos novaj Esperanto-parolantoj kaj novaj parolantoj gravas por la ŝatantoj de la Esperanto-kulturo kaj por la idealistoj de la movado. Tre amuza estis la intervjuoj kun fikciaj radio-stacioj. Unu de la ĵurnalistoj estis ege malica kaj demandis tre stultajn kaj ĝenajn aferojn. Pli bonŝanca estis la alia intervjuito, kiun intervjuis bona kaj informita ĵurnalistino. Esenco de ambaŭ intervjuoj estis, ke oni devas bone prepari la aferon kaj ke oni devas laŭeble lasi bonan, pozitivan kaj

Guadalajara: diskutas aktivuloj de Meksika Esperanto-Junularo. (Fotis Martin Schäffer)



simpatian impreson ĉe la aŭskultantoj.

Dum la kongreso fondiĝis meksika ILEI-sekcio. Ĝin estros la juna Esperanto-instruisto Carlos Fernando Hernández (Querétaro). Ankaŭ reelektiĝis nova estraro por Meksika Esperanto-Junularo. Ĝin estros Sergio Romero (Querétaro).

Formalaĵoj ankaŭ gravas kaj tial ni menciui la ĝeneralan asembleon de Meksika Esperanto-Federacio. La estraro raportis pri la farita laboro dum 2010. Speciale menciindaj estis la sukcesoj en universitatoj kiel la kursoj en la universitato de Baja California, Querétaro kaj la urbo de Meksiko. Menciindas alia rekordo: Meksika Esperanto-Federacio atingis membro-rekordon dum la kongreso. Nun apartenas al MEF 167 membroj el 20 meksikaj federaciaj ŝtatoj.

La registaro de la federacia ŝtato Jalisco multe helpis nin, kaj ni povis aranĝi kulturan vesperon en la kulturdomo de Jalisco. La vespero estis malferma al la loĝantaro. Ni ĝuis prezentadojn de la fama franca kantisto JoMo, pianisto José Gabriel Jiménez Rendón, fagotisto Armando Hernández Tellez, fagotistino Ana Lilia López Díaz, kantisto Leonardo Jáuregui Soto, kaj de la konata rokgrupo *Les Peatonos*.

Dum la meksika vespero ni povis ĝui kantojn de Georgo Handzlik. Sabate Georgo krome prezentis la teatraĵon *Ludoviko Zamenhof*. La aŭskultantoj entuziasme aplaudis.

Dimanĉe la partoprenantoj lace, sed ege kontente veturis hejmen. Tamen eta grupo restis, ĉar dumkongrese okazis ekzamenoj kaj la parola parto okazis post la fino de la kongreso. Entute kvin homoj ekzameniĝis. Jen plia rekordo!

**Martin Schäffer**



MKR-22: Post eta fotopaŭzo oni ekiras supren. (Fotis Vanja Radovanović)

## EAF vizitis Laponion

La Aŭtunaj Tagoj 2011 de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis 9–11 sep, kaj ĉi-foje konsistis ĉefe el vojaĝo al la Nordo. Bazejo estis la urba hotelo en la duobla finn-sveda urbo Tornio/Haparanda, kun kiu ni konatiĝis per busa gvido kaj promeno laŭ la limrivero kaj vizito de preĝejo sur la sveda flanko.

La ĉefcelo de la Tagoj estis busa ekskurso al la sveda Pajala, kie ludas la filmo laŭ la romano de Mikael Niemi *Populärmusik från Vittula*, kun sceno en Esperanto. La vojaĝo okazis laŭlonge de la Tornio-rivera valo, kun haltoj en Kattilakoski proksime de la Polusa cirklo (kie brila suno des pli beligis tiun turisman lokon), en Övertorneå por viziti preĝejon kaj ĉe la monteto Keisari [Imperiestro] kun ties raviga rondrigardo super la ĉirkaŭantan pejzaĝon Aavasaksa.

La loko rilatas al Lars Levi Laestadius, en kies muzeo ni ricevis plian gvidon. Laestadius estis vaste interesita kaj sperta pastoro en Pajala (kie li ankaŭ mortis), inter alie lernanto de la fama botanikisto Linné, kaj entreprenis ekskursojn en la proksimeco kaj pli foraj lokoj kiel Norvegio por esplori kaj katalogi plantojn. Tiel li iĝis spertulo pri arka flaŭro, kvar plantoj ricevis nomon laŭ li. Kiel parolanto de loka dialekto/lingvo finnsveda kaj samea, li disvastiĝis branĉon de luteranismo inter sameoj, kaj estas rigardata apostolo de sameoj.

Kun malpli ol 20 partoprenantoj la aranĝo ne estas rekorda, sed ja ebligis vidi lokojn ne ofte atingeblajn. Sunbrilo dum la plej belaj vidaĵoj alportis belajn memorojn al tiuj, kiuj aŭdacis kunveturi en noktaj trajnoj kaj busoj.

**Robert Bogenschneider**

## Modesta Somera Festivalo

Kompare kun la solenaĵoj, kiuj akompanis la 50an jubileon de la Somera Festivalo en Barlastono en 2010, la ĉi-jara evento estis pli modesta afero. Pro malfacilaĵoj ĉe la kolegio ne eblis propagandi ĝin, kaj aliĝis nur 15 homoj. Tamen oni kiel kutime ĝuis la okazon kvin tagojn tranokti, bonege manĝi kaj studi en grandaj komfortaj brikvilaĵoj en bela kampara vilaĝo. En apuda domo troviĝas la Brita Esperanto-Centro kun librovendejo kaj granda biblioteko, kie eblas studi sendepende.

Malcolm Jones prizorgis la grupon de progresintoj kie oni precipe pritraktis beletron, i. a. iujn aparte defiajn poemojn. Ĉe la progresantoj, kiujn instruis Jack Warren, oni celis la paroladon de la lingvo per diversaj temoj: medio, naturo kaj ĉiutaga vivo.

Vespere prelegis Jack Warren pri svedaj popolaj murpentraĵoj kaj Paŭlo Gubbins pri ĝardena etfervojo, kiun li mem konstruis. Fine de la kurso la partoprenantoj prezentis distran vesperon.

**Jack Warren**

## Pri la kvakeroj en 15 lingvoj

La kvakera movado ekestis en Anglio, kaj pro tio la modernaj eŭropaj kvakeroj multe uzas la anglan internacie. Tial estas ĝojige ke nova interreta kurso, kiu prezentas kvakerismon al novuloj, aperas en 15 lingvoj, kaj ke inter tiuj estas Esperanto.

Kvakeroismo estas sendogma religio kun radikoj en la kristismo de la 17a jarcento, bazita sur silentaj kunvenoj, kaj la kurso celas konatigi interesiĝantojn pri la kvakeraj tradicioj kaj praktiko.

**Douglas Draper**

## Ĝuante la malfruan alpan someron

Ĉi-jare somero en la suda Eŭropo daŭris pli longe ol kutime — fine de septembro la temperaturo ankoraŭ estis somera, marborde plaĝoj estis ankoraŭ plenaj da naĝantoj kaj sunumantoj kaj altajn montojn anstataŭ unua neĝo beligis forta suno.

La 22a Montkabana Renkontiĝo (MKR) uzis la lastan belegan kvazaŭsomeran semajnfino (28 sep – 2 okt), por gvidi siajn partoprenantojn al la montaro Karavanke kiu longas pli ol cent kilometrojn, inter Italia-Slovenia limo kaj la okcidenta Kroatio. MKR estis organizita en la montkabano Valvazorjev dom (1180 m) proksime al la plej nordokcidenta slovena urbo Jesenice. Ĉi-jare partoprenis 25 personoj el Kroatio, Hungario, Slovakio, Ĉeĥio, Svedio kaj Slovenio.

La unua ekskurstago gvidis la ekskursantojn tra pluraj paŝtejoj kaj vastaj arbaroj al valo de la rivereto Završnica kaj montkabano ĉe ĝia fonto je 1425 m. Tiuj por kiuj ne sufiĉis la 3-hora migrado ĝis la kabano daŭrigis la migradon al la pinto Veliki vrh (2060 m) sur la monto Begunjščica — por fari de tie vastan rigardon super la tuta nordokcidenta Slovenio.

Tio estis nur “preparo” por la ĉefa celo — supreniro sur la plej altan pinton de Karavanke. La pinto nomiĝas Stol (“seĝo” slovene), kaj ĝi estas la plej alta (2236 m) en la tuta ĉirkaŭaĵo abunda je pintoj inter 2000 kaj 2200 metroj — rigardo de ĝi estas unu el la plej belaj kaj vastaj en la tuta regiono, interalie al la valo de la rivero Sava kaj al la lago de Bled.

La vojo al Stol estas sendanĝera, sed laciga pro la granda altecdiferenco, kaj plejmulto da partoprenantoj sukcesis surgrimpi la pinton kaj ĝui nekredible belan veteron, sennuban ĉielon kun forta suno kaj preskaŭ sen vento — malofta sperto en montoj de tiu alteco.

La lastan tagon oni uzis por vizito de la konata turisma urbeto Bled kaj ĝia ĉirkaŭaĵo — plej konata vidindaĵo estas samnoma lago apud la urbo kaj la kanjono Vintgar tra kiu gvidas vojo plena da lignaj pontoj.

Bedaurinde, la fino de MKR venis tro rapide ... sed tiuj tagoj de la komenco de oktobro venigis ne nur la finon de la renkontiĝo, sed ankaŭ la finon de la kvazaŭsomera vetero: nur kvin tagojn poste falis la unua neĝo kaj blankigis la tutan montaron!

**Vanja Radovanović**

## Novjarfestoj en Esperantujo

### en la kastelo Greziljono

Venu kune festi dum la jarfina semajnfino aŭ amuziĝi eĉ dum tuta semajno: ekde 26 dec 2011 ĝis 2 jan 2012. Venu kun via familio kaj geamikoj, ili bezonas koni nur unu Esperanto-vorton: “fantomo”.

Por serene dancadi kun kastelaj fantomoj, masko-vestu vin kiel ili, diamant-brile aŭ dent-timige. Prelegu pri sorĉitaj anglaj kasteloj aŭ alia temo.

✉ [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)  
<http://gresillon.org/jarfino>

### en la apudlima Xanten

IF, la tradicia aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj, invitas vin al sia 28a Festivalo 27 dec 2011 – 3 jan 2012 en la okcidentgermana Xanten, histori plena urbeto, proksima al la nederlanda limo. La nederlanda Nijmegen estos celo de nia tuttaga ekskurso, kun krosado kaj krespo-manĝado surŝipe.

La ĉi-jara temo “Benelukso” rilatas al la najbaraj ŝtatoj Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio, i.a. kun fakaj kontribuoj de Kristin Tytgat, Brian Moon kaj Rob Keetlaer. Paralele al prelegoj okazos promenoj en la urbeto Xanten kaj ĝia arkeologia parko. En la postIFA tago ni vizitos najbaran akvo-kastelon.

✉ [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de)  
<http://www.internacia-festivalo.de/>



### en Gdansk

La Junulara Esperanto-Semajno post Zakopane '09 kaj Burg '10 ne plu bezonas rekomendon. Ĉi-foje la internacia pola-germana teamo invitas por 27 dec 2011 – 1 jan 2012 al Gdansk, la urbo de Daniel Gabriel Fahrenheit, Artur Schopenhauer, Günter Grass, Jan Heweliusz kaj Lech Wałęsa (Honora Patrono de JES).

Neforgesebla etoso, neordinara temo kaj homoj, nestreĉa programo, nemalbela loko, nekutimaj ideoj.

JES signifas la junularan etoson: ne forgesu tion se vi preferas trankvilajn aranĝojn!

✉ [jes@pej.pl](mailto:jes@pej.pl)  
<http://jes.pej.pl/2011/>



La unua LF en Ufa pasis solide kaj impone.

### La unua LF en Baŝkortostano

23–24 sep 2011 en Ufa, la ĉefurbo de Baŝkortostano (en Ruslando), solide kaj impone pasis la unua lingva festivalo sur la baŝkira tero. 88 prezentantoj konigis al la vasta inteligenta publiko 42 lingvojn. En la festivalo partoprenis tri spertaj kaj unu komencanta esperantistoj: Nina Cvileneva, Nikolao Ŝigajev, Gafur Gazizi kaj Diana Mironova — la ĉefa kunorganizantino de la unua baŝkiria lingva festivalo.

La festivalon aŭspiciis la Ministerio de klerigo de Baŝkortostano, la Baŝkortostana Unesko-komitato, kaj la “gastiganto” de la festivalo — Baŝkortostana ŝtata universitato.

La festivalo plaĉis al multaj partoprenintoj, kaj estis decidite ke la lingvaj festivaloj estu tradiciaj ankaŭ en Baŝkortostano.

Gafur Gazizi

### LF en la Usona kultura centro

La 9an de oktobro en la Usona kulturcentro, situanta en la Fremdlingva biblioteko en Moskvo, okazis lingva festivaletto, dediĉita al la dekjariĝo de la Eŭropa Tago de Lingvoj (la 26a de septembro). Ĝin okazigis la Moskva junulara Esperanto-klubo EK MASI, kiu jam kvin fojojn organizis grandajn Lingvajn Festivalojn en Moskvo.

La direktoro de la Centro Kore Gleason kaj la vicdirektoro Irina Ĉernenjkaja

vizitis nian 5an festivalon kaj proponis okazigi lingvan festivaletton en la Usona kulturcentro, ĉar en Usono loĝas tiom da popoloj, ke ajna prezentota lingvo certe troviĝos en la landaro. Niaflanke, ni petis ĉiun lingvoprezentanton menciigi en sia rakonto la staton de la koncerna lingvo en Usono.

Post malfermo kaj salutvortoj Miĥail Derbasov rakontis pri la Eŭropa Tago de Lingvoj, kaj Kore Gleason angle prezentis la lingvan situacion en Usono. Nikolao Gudskov prelegis pri Esperanto en Usono. Oleg Ĉajka kantis en Esperanto.

Sekvis tri serioj de lingvaj prezentoj, po tri lingvoj en ĉiu: (1) Esperanto, la franca kaj la latva; (2) la rusa, la kartvela, la cigana; (3) la pola, la hispana kaj denove la kartvela. Dum la prezentadoj okazis tradicia gustumado de elitaj ĉinaj teoj. En granda paŭzo tre vigle pasis lingva kvizo de Miĥail Ĥaminskij.

Fine de la festivaletto estis emnigitaj diplomoj, kaj la programon finis diverslingva koncerto. La etoso estis tre kora, malstreĉa kaj pozitiv-plena.

Ĉeestis ĉirkaŭ 160 homoj, inter kiuj unufojaj vizitantoj de la Usona Centro kaj de la Lingva Festivalo. Unu el ili skribis al mi: “La unuan fojon mi vizitis Lingvan Festivalon, kaj min simple surprizegis la amika etoso. Ĉio faritis kun tioma sindono, tioma inspiro... Fantaste! Grandan dankon al vi pro la organizo de la Eŭropa Tago de Lingvoj!”

Irina Gonĉarova

**La abontarifo  
de La Ondo de Esperanto en 2012  
denove restas la sama. Tuj (re)abonu!**

## Unufraze

★ Komence de septembro diversnacia teamo de TEJO partoprenis per sia propra budo la Volontulan Vilaĝon en Bruselo sur la placo antaŭ la Eŭropa Parlamento k en la metiejo instruis Eon k aranĝis ludon pri Eo. (*TEJO Tutmonde*)

★ Itala E-Federacio 24 sep aranĝis informojn en la granda tutlanda “Marŝo por paco” kun 200 mil marŝantoj; kvin mil antaŭpretigitaj informiloj estis disdonataj — multaj aliĝis al la retaj E-kursoj. (Landa Agado).

★ Pli ol cent mil homoj venis al la Ter-globa Festivalo (1–2 okt, Tokio), kie inter ĉ. 250 budoj de diversaj organizoj ankaŭ Japana E-Instituto starigis sian budon por informi pri Eo k multfoje okazigis kvinminutan E-kurson, kiun partoprenis ĉ. cent homoj. (Landa Agado)

★ Dana E-Asocio k aliaj NROj (inkluzive de la Danlanda UN-asocio) aranĝis 21 sep diskuton “La vojoj al paco – ĉu milito estas solvo?” kun partopreno de politikistoj. (Landa Agado)

★ Sveda E-Federacio 26 sep kunorganizis Lingvan Festivalon en la Eŭropa domo de Stokholmo ĉefe danke al la aktivado de Olof Petterson k Roland Lindblom. (Landa Agado)

★ Zlatoje Martinov, oficiala delegito de la Ea PEN-Centro reprezentis la E-literaturon en la 77a Internacia PEN Kongreso en Belgrado, kiun partoprenis 83 PEN-centroj. (HeKo)

★ Kultura Kooperativo de E-istoj efektivigis la 116an sendon de libroj en aŭ pri Eo kadre de sia kampanjo *Esperanto en la bibliotekojn*; al Biblioteca Municipal de Conceição (Ipanema) oni sendis dek librojn. (Aloísio Sartorato)

★ 25 sep komenciĝis E-kurso por tridek personoj en la Biblioteko de Foshan (Guangdong-provinco, suda Ĉinio); ĝin gvidas la hispana E-instruisto Augusto Casquero. (EPĈ)

★ ELF/AREK, internacia asocio de filatelistoj k esperantaj-kolektantoj, 8-11 sep renkontiĝis en Prago lige kun la internacia foiro Sbiratel (Kolektanto); la asocioj ne nur partoprenis komune la foiron, sed ankaŭ kunsidis tie en foira komerca centro. (Petr Chrdle)

★ La 120a naskiĝdatreveno de Ismael Gomes Braga estis la ĉeftemo de la 10a Spiritista E-ista Renkontiĝo, okazinta 11 sep en Rio-de-Ĵanejro kun pli ol 70 partoprenantoj k riĉa arta programo. (Paulo Kverko)



Profesoro Zuckermann parolas en Esperanto.

## La plej azia Pluezeka renkontiĝo

13–20 aŭg okazis la 15aj Esperantaj Renkontiĝoj en Pluezeko (Bretonio). Ĉi-jare Azio estis la honora mondoparto pro la alveno de profesoro Ranga Potturu el Barato kaj la ĉeesto de granda grupo de ĉinaj esperantistoj.

La partoprenantoj gaje plibonigis sian Esperantan lingvoscion danke al eksterlandaj instruistoj. Oni lernis serioze, sed oni ankaŭ kantis kune. Profesoro Ranga instruis al ni la ajurvedan medicinon, kaj ni instruis al li la bretonajn dancojn. Saukio Zhang prelegis pri la nuna Ĉinio kaj ni montris al la ĉina grupo belajn bretonajn lokojn.

Posttagmeze ni ĉeestis interesajn atelierojn kaj ekskursis.

Pasint-jare, Poŝraj Subedi invitis nin viziti Nepalon dum la 9aj himalajaj renkontiĝoj. Ok el la Pluezekaj partoprenintoj akceptis tiun inviton kaj ni estis kore akceptitaj en Nepalo. Nuntempe, niaj ĉinaj amikoj invitas nin en Ĉinio, kie okazos en januaro Esperanta Monato en la Esperanto-insulo Hai Nan kun tre interesa programo.

**Roger Eon**

## 372 koreoj eklernis Esperanton

En la aŭtuna semestro sume 372 gestudentoj el tri universitatoj (Universitato Korea Fremdlingva, Universitato Dankook kaj Universitato Wonkwang) aliĝis al Esperanto-kurso, kiu estas unu el elekteleblaj lingvoj kun du notoj por unu semestro. La studentoj lernos la bazan gramatikon de Esperanto dum kvar monatoj kaj provos en Esperanto interparoli per Skajpo kaj interkomunikiĝi en Fejsbuko.

**Lee Jung-kee**

## Festa lanĉo la 11an de septembro

La 11a de septembro, monde memorata tago, iĝis por la Aŭstraliaj esperantistoj tago de sukceso. Post du jaroj da preparoj ĝuste 11 sep 2011 estis malfermita ekspozicio pri Esperanto en la Migra Muzeo de Adelajdo.

La ekspozicion, viziteblan dum tri monatoj, malfermis profesoro Ghil’ad Zuckermann, profesoro pri lingvistiko kaj endanĝerigitaj lingvoj de la Universitato de Adelajdo.

La ekspozicio donas larĝan vidon al la temo “Esperanto: antaŭenigo de ĉies lingvo”, prezentante la mondan kaj aŭstralian historion de Esperanto, la atingojn, uzadon, argumentojn kontraŭ kaj por, mallongan gramatikon kaj elstarajn personecojn de la kontinento mem. Kongrue al la celoj de la muzeo unu aparta afiŝo estas dediĉita al la sud-aŭstraliaj enmigrintoj-esperantistoj. Konstante prezentata tie estas la nova dokumenta filmo de Sam Green: *The Universal Language*. Por la lernejaraj grupoj estas preparitaj laborfolioj, libere forpreneblas informiloj kaj Esperantorevuoj.

**Katja Steele**

## Ekspozicio en Katalunio

En la nova sidejo de la Ateneo de Populara Kulturo de la urbo l’Hospitalet de Llobregat (Barcelono) 5–16 sep funkciis ekspozicio de Esperanto. Ĝi estis multnombre vizitata de membroj de la asocio kaj de multaj urbanoj.

La ekspozicio estis plenplena de Esperantaj afiŝoj de internaciaj kaj naciaj kongresoj, desegnoj pri instruado de esperanto, kaj ankaŭ ok paneloj kun Esperantaj bildkartoj de diversaj landoj, monumentoj dediĉitaj al doktoro Zamenhof, kovertoj de korespondado, kristnaskaj gratuloj, pri la Esperantomuzeo de Sant Pau d’Ordal, pri fotoj de Esperantaj stratoj, vinjetoj, ktp.

Ankaŭ estis tri tabloj. Sur la unua estis libroj: esperantaj antologioj, vortaroj, gramatiko, monda literaturo, eseoj; libroj pri religio, teatraĵoj, politikaj verkoj, literaturo por infanoj k. a. Alia tablo surhavis revuojn el la tuta mondo, kaj la tria — turismajn informilojn pri multaj urboj en Esperanto.

La lastan tagon oni celebris la fermon de la ekspozicio per malgranda parolado, finante poste per bongustaj manĝetoj.

**Martí Guerrero i Cots**



Eŭropaj moŝtuloj sin helpas el la kasoj de krizaj bankoj. (Foto de la Eŭropa Komisiono)

## La samaj malnovaj eraroj

### de Dafydd ab Iago el Bruselo

Tri jarojn post la komenco de la krizo kaj de la enorma ŝtata subvencio al la financa sektoro, Belgio, Francio kaj Luksemburgio ripetis la saman eraron. Oni kalkulas, ke la belga ŝtato ŝuldiĝis je 4000 eŭroj po belgo por garantii la ŝuldojn de la banko *Dexia*.

La falo de la banko *Dexia* ligiĝis kun pruntoj al la greka ŝtato. Pro la nekapablo repagi siajn ŝuldojn pro la greka ŝtato *Dexia* perdis la konfidon de aliaj bankoj kaj monpruntojn. Tamen la malfacila situacio de la banko ne malhelpis ĝin pagi unu milionon da eŭroj al sia franca ĉefo Pierre Mariani en 2009 eĉ se, lastajare, li gajnis nur 300 mil eŭrojn.

Post la aĉeto de la banko fare de la belga ŝtato la ĉefo de direktora konsilio de *Dexia*, Jean-Luc Dehaene, anoncis ke li ne plu akceptos sian salajron de 88 mil eŭroj. Ĉu la eksĉefministro de Belgio donas bonan ekzemplon al aliaj politikistoj kaj industriĉefoj? Bedaŭrinde, estis ne facile por Dehaene ne insisti pri salajro en la bankrotinta banko. Li jam ricevas ĉirkaŭ 100 mil eŭrojn jare de la Eŭropa Parlamento, sed li devis pro sia aĝo ĉi-jare rezigni pri 80 miloj de *InBev* — la plej granda bierproduktanto en Belgio. Oni ankaŭ devintus menciigi liajn oficojn en pliaj tri firmaoj, de kiuj la eksĉefministro enpoŝigis preskaŭ 100 mil eŭrojn en 2010. Tamen pro sia aĝo li ankaŭ tie ne plu ricevas “poŝmoneton”.

La agado de politikistoj kaj industriĉefoj estas ne nur belga problemo. En Hispanio, unu el la eŭro-landoj plej trafita de la krizo, evidentiĝis ke la direktoroj de malsanaj bankoj profitas de la financa subteno per la hispana ŝtato. Finfine, oni maldungis la ĉefinon de la malsana banko *Caja de la Caja de Ahorros del Mediterráneo*. Spite al la enorma financa helpo de la ŝtato, la direktorino María Dolores Amorós mem decidis sian propran salajron: 593 mil 40 eŭroj jare. Kaj post la maldungo ŝi havas pension 30 mil 791 eŭroj ĉiumonate.

|   |   |
|---|---|
| <b>RADIO</b>  | <b>Radio Esperanto</b>  |
|  | <i>Halina kaj Aleksander<br/>parolas el Kaliningrado</i>  |
| <b>ESPERANTO</b>  | Podkasta servo de <i>La Ondo</i><br>Aŭskultu: <a href="http://la-ondo.rpod.ru">http://la-ondo.rpod.ru</a> |

## E@I: tri novaj projektoj

### Esperanto elektronike — tria eldono

Kvin jarojn post la unua eldono (somero 2006) aperis jam la tria eldono de la disko *Esperanto elektronike*. Por la nova eldono estis kolektita nova riĉa materialo — aldoniĝis ĉ. 2GB da novaj eroj: libroj, gazetoj, kantoj, filmetoj ktp.

Danke al kunlaboro de pluraj Esperanto-organizoj kaj unuopuloj aperis eĉ pli riĉa disko, kun multaj interesaj kaj valoraj aferoj. Ekzemple, en ĝi estas pluraj jarkolektoj de gravaj Esperanto-gazetoj: *La Ondo de Esperanto*, *Esperanto*, *Monato*, *Kontakto*, *IPI*. Kunlabore kun *Vinilkosmo* estas aldonitaj 20 novaj kantoj, enestas ĉiuj partoj de la filmo *Esperanto estas...* Aktuale ankaŭ aperas pli nova Esperanto-versio de Vikipedio kaj tute nove estis aldonita la tuta Esperanto-versio de la projekto *Tatoeba* kun 83.939 frazoj en Esperanto kune kun ĉiuj iliaj ekzistantaj alilingvaj tradukoj.

E@I produktis 6000 diskojn, kaj danke al antaŭmendoj efektive restis nur 500 ekzempleroj. La tuta nova eldono aperis danke al la plej granda antaŭmendo de Francio, kie la landa asocio UFE mendis 3000 ekzemplerojn. La prezo de nur unu eŭro por unu ekzemplero de la disko ebligas pli facilan kaj pli amasan aĉeton kaj distribuon de ĝi.

Adreso kun pliaj detaloj: <http://dvd.ikso.net>

Mendi la DVDjn eblas ĉe: [dvd@ikso.net](mailto:dvd@ikso.net)



### Gajnintoj de *lernu!*-konkurso

La retejo *lernu.net* starigis ĉi-jare konkurson okaze de 100 mil uzantoj ĉe *lernu!* kun valoraj premioj:

— Portebla komputilo *Acer Aspire* (Intel Dual core P6100 (2.0GHz), 4GB RAM, 320GB, 15.6", Windows 7 Home Premium);

— Portebla minikomputilo *Asus Mini Notebook Computer* (Intel Atom N270 Mobil CPU (1.6GHz), 1GB RAM, 160GB, 10.1", Windows XP Home).

Por partopreni la konkurson necesis krei amuzan kaj interesan reklamon pri *lernu!* Tio povis esti mallonga filmeto, interesa foto, aŭ bele desegnita bildo. Entute venis pli ol 60 laboroj, el kiuj 58 estis akceptitaj por la konkurso.

La voĉdonado finiĝis, kaj en oktobro estis elektitaj gajnintoj de la konkurso. La unua gajninto, kiun elektis *lernu!*-uzantoj, estas Eva Fitzelová el Slovakio, kies bildo (vd. p. 22) kolektis plej multe da voĉoj. La dua gajninto, kiun elektis la teamo, estas Daniel Voß, el Germanio, kiu sendis al la konkurso interesan filmeton.

La teamo de *lernu!* gratulas ambaŭ gajnintojn kaj dankas al ĉiuj, kiuj partoprenis la konkurson. La tutan liston de konkursaĵoj kaj rezultojn de la voĉdonado vi povas vidi ĉe:

[http://lernu.net/mia\\_lernu/konkursoj/centmil/rezulto.php](http://lernu.net/mia_lernu/konkursoj/centmil/rezulto.php)

### E@I-kampanjo por ESF

Kun ambicia celo kolekti 100 mil eŭrojn ĝis la fino de 2012 por la fondaĵo ESF (Esperantic Studies Foundation) lanĉis ĉi-somere E@I novan donac-kampanjon. (Legu pli detale en la oktobra *Ondo*.) Dum la lastaj semajnoj estis starigita retejo kie eblas observi la progreson de la donacado, legi novaĵojn kaj ankaŭ informojn pri ESF.

<http://kampanjo.ikso.net/>

Peter Baláž

E@I-kunordiganto

# Ĉu malesperi?

de Trevor Steele

## Du kongresoj

Ĉi-jare okazis landa Esperanto-kongreso en Aŭstralio. La nivelo de la prezentaĵoj estis ĝenerale bona, kaj du elstaraj alilanduloj, Humphrey Tonkin la intelektulo-oratoro kaj JoMo la kanzonisto, estas pintuloj en siaj fakoj.

La kongreso celis celebri cent jarojn da kongresoj en Aŭstralio: la unua ĉi-landa kongreso okazis en la sama urbo, Adelajdo, eĉ en la sama domaro de la Universitato de Adelajdo, kiel antaŭ 100 jaroj. Ne eblas ne kompari kelkrilate la du kongresojn.

Ne estas dubo, ke la lingvonivelo de 2011 multe superas tiun de 1911. La broŝuro produktita kiel resumo de la kongreso de 1911 eksplicite diras de tempo al tempo, ke s-ro X. parolis en Esperanto — oni devas do konkludi, ke grandparte la angla estis parolata, kaj la malmultaj citoj en Esperanto ne imponas lingve (“la mondon estas sufichi grandan por ni”). La kongreso de 2011 daŭris pli ol semajnon, estis tute esperantlingva, kaj proponis programon riĉan je diverseco. Tiu de 1911 estis kelktaga kaj malriĉa kulture: baze oni klarigis (grandparte angle), kial Esperanto estus utila en komerco, en edukado, en scienco, ktp., kaj krome oni aŭskultis kantadon en Esperanto kaj ekskursis.

Do ja certe estis lingva progreso en la jarcento. Sed fotoj de la du kongresanoj sobriĝe pensigas: niaj nunaj anoj

estas malpli multaj kaj averaĝe pli maljunaj ol tiuj antaŭ cent jaroj, kaj la societa prestiĝo estas nun sendube malpli alta. En 1911 Esperanto estis io nova, atentokapta. Patronis la kongreson la guberniestro, episkopoj, ministroj, la urbestro, aro da universitataj profesoroj, kaj dekoj da aliaj gravaj homoj. Ŝajnas, ke eĉ homoj, al kiuj lingvoproblemoj ne multe influis la vivon, tamen volis esti parto de tiu freŝa kampanjo. Kaj ŝajne ĉiuj kredis, ke Esperanto nehaltigeble venkos baldaŭ, ja la ideo estis tiel logika kaj la lingvo mem tute taŭga. Tion diris konvinkite eĉ neesperantistoj: la guberniestro, la urbestro, la ministro pri edukado, kaj aliaj eminentuloj.

Ho ve! Ĉi-foje, kvankam la LKK informis ĉiujn ĵurnalojn en Suda Aŭstralio pri la kongreso, apenaŭ venis eĥo. Malgraŭ dekoj da afiŝoj pendigitaj en universitatoj, neniu studento aŭ instruisto montris intereson. Jes, ĉe la inaŭguro profesoro reprezentis la universitaton, sed lia kelkminuta paroladeto temis pri la universitato, ne pri Esperanto. Kampanjoj por persvadi la poŝtan instancon eldoni poŝtmarkon kun aludo al Esperanto, kaj por nomi iun straton en Adelajdo laŭ Zamenhof aŭ Esperanto, neniel sukcesis.

## Progreso aŭ la malo?

Observanto, kiu sciis nenion pri la interna vivo de nia Esperanto-movado,

devus konkludi, ke en la alekstera agado fakte estis regreso, ne progreso, dum la cent jaroj. Kaj mi suspektas, ke la saman konkludon oni povus fari en plejmulto el la landoj, kie iam estis relative vigla Esperanto-movado. (Mi konscias, ke tia vidpunkto estas iom eŭropcentra: certe Esperanto pli viglas nun en Afriko, ekzemple, ol antaŭ cent jaroj).


Studado de la membrostatistiko de UEA estas tristiga. La grafikajo iras suben, suben. Kelkaj atentigas, ke hodiaŭ oni ne emas aliĝi al kluboj aŭ asocioj, oni povas venigi la mondon al si per interreto kaj la televida ekrano. Nu jes, estas statistikoj, kiuj indikas, ke ie estas kelkaj miloj da homoj, kiuj lernas kaj uzas Esperanton pere de la interreto, kaj tiaj homoj malofte sentas bezonon membriĝi en la oficiala movado.

Sed eĉ se estus miliono da kaŝitaj komputil-esperantistoj, ni estus mikroskopa parteto de la monda loĝantaro.

Kial mankas progreso? Ĉu ni devas forigi la ĉapelitajn literojn por havi “normalan alfabeton”? Ĉu ni devas importi multajn vortojn el aliaj lingvotradicioj, ekzemple la ĉina, araba, svahila? Ĉu ni devas trovi pli efikajn manierojn por havigi monon? Ĉu ni devas entute modernigi niajn agadmanierojn?

Ĉiuj argumentoj, kiuj kulpigas la lingvon mem pri la stagnado, malvalidas. Eĉ homoj, kiuj opinias Esperanton senperspektiva iluzio, foje cedas, ke ĝia strukturo estas admirinda. La sola “lingva” argumento, kiu iom validas, nome ke Esperanto donas avantaĝojn al homoj, kies unua lingvo estas eŭropa, multe pli validas, se temas pri la angla. Neniu povus serioze aserti, ke Esperanto estas perfekta aŭ absolute simpla — ĝi ja havas akuzativon, refleksivon, transitivajn kaj netransitivajn verbojn, kiuj prezentas problemojn por la plimulto de la uzantoj. Sed kompare kun iu ajn nacia lingvo, pri kiu mi havas iom da sperto, la Zamenhofa elpensajo estas elstara kombinaĵo de reguleco kaj esprimpovo.

Jes, do kial la perspektivoj ŝajnis tiom pli brilaj en 1911 ol en 2011?



Adelajdo, 1911: La unua landa kongreso.

## La mondo ŝanĝiĝis

En 1911 la internacia lingva situacio estis tre malsimila al la nuna. Tiutempe la franca ankoraŭ estis la plej prestiĝa lingvo, sed la angla kaj germana iĝis ĉiam pli fortaj konkurencantoj. Pli kaj pli da homoj sentis la bezonon de internacia lingvo, kaj la verdsteluloj esperis, ke oni prudente decidus elekti nenium el la tri, sed anstataŭe neŭtralan, relative facile lerneblan lingvon.

Hodiaŭ tiu situacio draste ŝanĝiĝis: la angla forbalais ĉiujn rivalojn kaj fakte multilate plenumas la rolon de internacia pontlingvo. Jes, *ni* scias, ke la angla estas malfacila kaj tre neregula, sed ŝajne centmilionoj da neanglalingvuloj akceptis, ke necesas elspezi multe da mono kaj doni multe da tempo al lernado de tiu “internacia” idiomo. Aktuale penseblas, ke la plej efika obstaklo al “tutmonda angla” estas la leviĝanta potenco de Ĉinio. Ĉu la ĉinoj kontentos akcepti la anglan lingvon en internaciaj rilatoj, aŭ ĉu ili ekspluatos sian ekonomian superecon por postuli ankaŭ lingvaj/kulturajn avantaĝojn?

Esperanto ŝajnas senperspektiva hobbio de manpleno da homoj, kiuj pensas eble idealisme, sed ne realisme.

Ĉu do rezigni? Malesperi?

De tempo al tempo oni aŭdas pri kabeintoj, kiuj evidente venis al tia konkludo. Sed la plejmulto el ni estas obstinaj, persistaj, kaj ne volas rezigni pri la ŝajne sizifa tasko.

Kaj se la angla vere atingus tiun statuson, kiun ni celas por Esperanto, ĉu tio ne estus granda beno por la homaro? Jes. Sed la rolon plenumus Esperanto multege pli efike: kaj krome, kiel Zamenhof emfazis, Esperanto estas pli ol lingvo: ĝi estas manifestaĵo de internacia pensmaniero. Tion oni ne povas diri pri iu ajn nacia lingvo.

Kaj internacia pensmaniero ne estas plu luksaĵo: la pretervivado de nia planedo dependas de ĝi. Detruado kaj malpurigado de la naturo ne haltas ĉe landlimoj. Financa krizo en unu lando povas signifi tutmondan krizon. Kiel ni kontraŭos la trovarmiĝon de la planedo, se ni pensas plue en naciaj, religiaj, aŭ kulturaj kadroj? Kaj kiel ni rompu barilojn inter grupoj, se ni ne povas interparoli unu kun aliaj?

Ŝajnas vere, ke la mondo ankoraŭ ne estas sufiĉe matura por adopti Esperanton. La decidoj pri tiaj aferoj estas ankoraŭ en la manoj de la potenculoj de la mondo, kaj ili ja profitas de la prestiĝo



La Aŭstraliaj Esperanto-kongresoj en 1911 (vd. p. 14) kaj en 2011 (supre) okazis en la sama universitata domo. La fotoj vidigas, ke antaŭ cent jaroj ni estis pli multaj kaj pli junaj.

de siaj lingvoj. Zamenhof revis pri kunlaboro inter gentoj, al kiu unuiga lingvo estus nur la unua paŝo. Al tio ni povas aldoni, ke ni luktas ne nur por kunlaboro sed ankaŭ por egaleco. Kompreneble adopto de tuthomara lingvo povus katalizi la estiĝon de tia pli bona mondo, sed ĉu eblas esperi, ke la lingvo triumfos, antaŭ ol la homoj plimaturiĝos? Ĉu la multspecaj krizoj instruos, devigos la homaron maturiĝi pli rapide, ol nuntempe imageblas?

### Ne multe dependas de ni

Se ni esperantistoj estas tiel malmultnombraj, evidente la eventuala triumfo de Esperanto venos ne pro niaj penoj, sed pro tio, ke potenĉavaj neesperantistoj fine komprenos la valoron de la Zamenhofa donaco al la mondo.

Estu nia konsolo, ke la lingva problemo, kiu aĝas same kiel la homo, estus relative facile solvebla, kaj la solvo povus veni en surprize mallonga tempo. Eĉ post tutmonda adopto de Esperanto restus problemoj pro kulturaj kaj religiaj diferencoj, sed almenaŭ ni havus lingvan rimedon por komenci serĉi solvojn.

Mi iam aŭskultis prelegon de Claude Piron pri tiu ĉi temo. Li diris, ke ne gravas, ĉu la esperantistoj bone aŭ malbone propagandas. La *ideo*, laŭ Piron, estas tiel evidenta kaj altira, kiam oni vere ĝin pripensas, ke *iam* ĝi devos venki.

Mi emas konsenti kun Piron. Mi scias, ke mi ne vidos grandajn progresojn dum mia vivo, sed mi havas kvaŭzoreligian fidon, ke jes ja *iam* Esperanto (eble en iom modifita formo) estos akceptita por la rolo intencita de ĝia aŭtoro.

Kaj tiu intenco estis *ne nur lingva*. La iama internacia lingvo estos esprimo de homa konscio pri la neceso kunlabori.

Ĉu do tia “kredo” implicas la sekvon, ke ni ne devas ion ajn fari? Ĉu sufiĉas nur atendi, ĝis la historia vento turniĝos? Nu, neniofarado signifus baldaŭan finon de la tuta nobla projekto; Esperanto ja povus malaperi. Kion ni do faru? Ni ja daŭrigu la propagandon, eĉ se niaj rimedoj estas tre limigitaj, ke Esperanto restu parto de la monda kultura pejzaĝo. Necesas vivteni la lingvon kaj la idealon; necesas evoluigi la lingvon, ke ĝi estu preta por servi en ia ajn situacio, ia ajn fako. Ni prilaboru terminarojn por ĉiu vivkampo: scienco, filozofio, komerco, religio, politiko, ktp., ke oni povu tuj uzi ĝin. Kaj ni neniam forgesu la idean flankon: Esperanto estas pli ol lingvo. Per tio, ke mi estas esperantisto, mi implicite esprimas mian pretecon renkonti ĉiujn aliajn homojn sur lingve neŭtrala tereno. Mi ne volas gajni pro la prestiĝo de mia unua lingvo, kaj mi ne volas esti en stato de malavantaĝo pro tio, ke via unua lingvo estas eventuale pli prestiĝa ol mia.

Intertempe ni agu ankaŭ “raŭmisme”: ni ĝuu nian komunan internacian ligilon kaj la riĉaĵojn, kiujn ĝi alportas al ni. Ekzemple, la ĵusa aŭstralia kongreso, ne priatentata de la publiko, evidente tre plaĉis al la partoprenantoj. Ni fidu, ke iam *ĉiuj* volos kunĝui.

Ni volonte aperigos en *La Ondo* komentojn pri la eseo de Trevor Steele. Oni povas komenti ĝin ankaŭ en nia retejo *La Balta Ondo*:

<http://sezonoj.ru/>

# Valerij Ŝumakov el la konstelacio Skorpio

de Halina Gorecka

**L**a 9an de novembro 2011 estas la 80a naskiĝdatreveno de la akademiano Valerij Ŝumakov, fondinto de la moderna Ruslanda transplantologio kaj scienco pri artefaritaj organoj. Dum pli ol 33 jaroj li gvidis en Moskvo la instituton de transplantologio kaj artefaritaj organoj, kiu nun havas lian nomon. Sed ne nur instituto. La nomo “Kirurgo Valerij Ŝumakov” estas donita al stelo en la konstelacio Skorpio.

Plena listo de liaj inventoj, atingoj kaj ordenoj kaj premioj okupus plurajn paĝojn. Ŝumakov, la unua en Sovetunio efektivigis greftadon de koro, hepato kaj pankreato. Ĝis siaj lastaj vivotagoj li gvidis la evoluigon de ĉiuj direktoj de la Ruslanda transplantologio: ekde greftado de organoj kaj histoj ĝis ksenotransplantado (grefto de bestorganoj al homo) kaj kreado de artaj organoj. Miloj da miaj samlandanoj ŝuldas sian vivon persone al la kuracisto Ŝumakov.

Valerij Ŝumakov naskiĝis la 9an de novembro 1931 en Moskvo, en la familio de inĝeniero-konstruisto. Firma decido iĝi kuracisto aperis ĉe la 14-jara lerneĵano post foliumado de anatomia lernolibro. Li aliĝis al la 1a medicina instituto kaj brile finis ĝin en 1956. Revante iĝi kardiokirurgo, Ŝumakov elektis specialiĝon en topografia anatomio, kiun la plejparto da studentoj opinias komplika kaj sendanka studobjekto. La pene akiritaj konoj igis lin, en la epoko de mallarĝa specialeco, kirurgo-universalisto: li virtuoze efektivigis operaciojn ne nur je koro, sed ankaŭ je renoj, bronkoj, hepato kaj pankreato.

Komence de la 1970aj jaroj Valerij Ŝumakov kun la usona kardiokirurgo Michael Ellis DeBakey ekgvidis la Sovetunian-Usonan grupon pri kreado de artefarita koro. Pli ol dudek jarojn daŭris la kunlaboro inter la du ŝtatoj.

En la postaj jaroj specialistoj de la instituto de transplantologio, unuavice li mem, efektivigis centojn da esploroj pri la problemaro de prognozado kaj preventado de reagoj de forpuŝo, kontraŭimuna terapio, konservado kaj kvalitaltigo de greft-organoj. La instituto aktive partoprenis en kreado de la landa sistemo de eligo, konservado kaj interŝanĝo de organoj, kunlaborante en ĉi tiu sfero kun ĉiuj landoj de la “Sovetunia bloko”.



*“Mi estas optimisto. Ĉar tio, pri kio mi okupiĝas, ne permesas pesimisman humoron. Necesas ĝis la fino konservi kredon je sukceso”.*

(Valerij Ŝumakov)

Komenciĝis provoj pri kreado de artefaritaj biologiaj sistemoj, reproduktantaj funkciojn de hepato, pankreato, lieno. Estis kreita la tekniko de envivigo al sukermalsanuloj de beta-ĉeloj de pankreato prenitaj el gen-modifitaj bestoj.

Tamen la ĉefan taskon la instituto longe ne povis plene realigi. Preskaŭ dudek jarojn Ŝumakov kaj liaj kolegoj dediĉis al akceptigo de diagnozo de morto de cerbo sufiĉa kondiĉo por elkorpiĝo de organoj. Sed ĉi tiun koncepton oni konsideris nekonforma al la socialisma moralo. Rezulte kreiĝis sakstrata situacio: ja renoj, elkorpiĝitaj post la halto de koro, taŭgas por grefto, sed hepaton, koron kaj bronkojn necesas eligi nur el la korpo kun la funkcianta koro. La sola fonto de tiaj organoj estas viktimoj de kraniaj-cerbaj traŭmoj nekunigeblaj kun vivo. Tamen la reguloj ne permesis opinii ilin mortintaj ĝis la halto de la koro.

Nur en februaro 1987 aperis provizora permesa dokumento de la sanprotektia ministerio. La unua provo estis malsukcesa, kaj okaze de plia malsukceso la fama kirurgo havus grandajn problemojn kun la “superaj estroj”. Sed la dua operacio pri grefto de koro estis sukcese farita de Ŝumakov la 12an de marto 1988 — bonŝance por la Ruslanda scienco. La pacientino kun nekurablebla kormalsano post la grefto vivis pli ol ok jarojn.

Nur danke al la penoj de Ŝumakov la instituto de transplantologio sukcesis travivi la unuajn jarojn post la perestrojko. Kun minimuma financado oni daŭrigis esplorojn, ekuzis novajn metodojn de organ-greftado. Oni sukcesis

eviti komerciĝon: en la plej malfacilaj jaroj du trionoj da pacientoj estis operaciataj en la instituto senpage, la plenan koston pagis nur alilandanoj.

Neniam ĉesis la laboro super la ĉefa projekto de Valerij Ŝumakov – artefarita koro, kiu kapablu konservi vivkapablon de paciento en daŭro de kelkaj jaroj. Sed sen sufiĉa financado oni ne plu povis konkuri kun la impete evoluanta Usona transplantologio, baziĝanta ankaŭ sur la Ruslandaj laboraĵoj. En 2000, kiam en Usono komenciĝis la unuaj enplantadoj de la artefarita koro AbioCor, la Ruslandaj sciencistoj ne sukcesis ricevi eĉ 10 milionojn da rubloj (400 mil dolarojn) por daŭrigi la esplorojn.

Dum sia tuta vivo Valerij Ŝumakov batalis kontraŭ nekomprene kaj antaŭjuĝoj, bremsantaj la evoluon de transplantado en nia lando. Li sukcesis atingi multon: ekzemple, danke al lia persona pledado reprezentantoj de la Rusa ortodoksa eklezio oficiale deklaris permesata la uzadon de kadavra organoj en medicino.

Valerij Ŝumakov havas du gefilojn kaj kvar genepojn. La edzino de Ŝumakov, Natalja, multajn jarojn laboris kiel anesteziisto. Lia filo, kirurgo Dmitrij, nun estas vicdirektoro pri scienca laboro en la instituto de transplantologio. Lia filino Olga estas arteksperto en la galerio Tretjakov. Laŭ la propra konfeso, Valerij Ŝumakov en sia laboro ĉiam iris rande de la ebleco, tenante sin je la devizo: “Antaŭen kaj neniu paŝon retro!”

Liaj konatoj rakontas, ke li ŝatis pasigi festojn kun la familianoj kaj amikoj. Precipe li ŝatis naskiĝtagojn de proksimuloj, Novjaron, Kristnaskon kaj Paskon. Li ŝatis foje fumi bonan cigaron kaj trinki viskion kun sodakvo, manĝi kankrojn, barĉon, ŝafan raguon. En somera tago li, se eble, naĝis en rivero aŭ lago. Multfoje li transnaĝis Volgon. Liaj ŝatataj prozistoj estis Aleksej Tolstoj, Ĉeĥov, Stendhal, Jack London. El la poetoj li preferis Puŝkin, Jesenin, Bayron.

Forta viro, vivĝuanto, kapabla rezisti batojn de la sorto kaj ... kora nesufiĉo (*insufficiencia cordis*). Valerij Ŝumakov faris operaciojn ĝis siaj lastaj tagoj. Li savadis homojn. Sed lin la operacio ne savis – lia koro estis tro eluzita. Li mortis dimanĉe, la 27an de januaro 2008.



En *La Ondo de Esperanto* (2011: №1, p. 17) Halina Gorecka recenzis mian libron pri la divers-etapa historio de la eldon-iniciato figurinta kaj plu disvolviganta sub la marko ILTIS. Ankaŭ la kompleta bibliografio de ĉiuj Iltis-titoloj (1968–2010) aperis en 2010 kiel ekstrakto el la pli ampleksa verko.

Kvankam estas amuze, ke multaj ligas la eldon-agadon de Iltis kun mia nomo aŭ eĉ identigas ilin ambaŭ, la realo alias kaj pli kompleksas. Vero estas, ke en 1968 sub la nomo Artur E. Iltis (mia artista nomo pasporte registrita) mi fondis minieldonejon kiu aperigis man-plenon da sveltaj broŝuroj student-poŝe financeblaj: la satiroj de Kanguruo *Kiel (mal)venkigi Esperanton?*, verketoj de René de Saussure, Eugen Wüster pri la prepozicioj de Esperanto, Zamenhof (faksimilo de la letero al Emile Javal) kaj Kálmán Kalocsay (*Mondo kaj koro*).

Poste, inter 1975 kaj 1998, aliaj uzurpis ĉi nomon kaj disvolvis nelegan eldon-agadon profitante de miaj kontaktoj kun internacie konataj aŭtoroj. Inter 1983 kaj 1988 aperis entute 62 titoloj en Jubilea Eldon-Serio kun kvin sekcioj: Beletro originala, beletro tradukita, esperantologio, interlingvistiko kaj scienco.

En 1988 la sarlanda presisto Ortwin Deubert kreis propran eldonejon sub la nomo Iltis kaj mi havis la okazon lin konsili. Fondiĝis, kun samaj sekcioj, Iltis-Serioj, kaj inter 1988 kaj 1995 aperis sume 35 titoloj plus sep jar-kolektoj de la revuo *Iltis-Forumo* (1989-1995).

La fekunda periodo 1978-1988 vidis la aperon de 129 titoloj. Gravan akcenton formis foto-represo de klasikaĵoj: Hendrik Adamson (*Auli*), William Auld (*La Infana Raso*), Marjorie Boulton (*Cent ĝojkantoj, Dekdu piedetoj*), Kálmán Kalocsay (*Ezopa saĝo*), Libro de amo, Reto Rossetti (*El la maniko*), Raymond Schwartz (*Vole novele, ...kun sia-speca spico, Kiel akvo de l' rivero*), Mason Stuttard (*Virinetto en bluo*); el la traduka sektoro: Dickens/Zamenhof (*Batalo de l' vivo*), Antoni Grabowski (*El Parnaso de Popoloj*), Goethe/Zamenhof (*Ifigenio*), Heine/Zamenhof (*La rabeno de Baĥerah*), Hans Weinhengst (*Turstrato 4*); en la rubriko esperantologio/interlingvistiko: Paul Neergaard (*La esperantologio kaj ties disciplinoj*), René de Saussure (*Resumo de la teorio de Antido, La vort-teorio de*


*Esperanto, La logika bazo de la vortfardo en Esperanto*), Vladimir Varankin (*Teorio de Esperanto*), Willem Manders (*Interlingvistiko kaj esperantologio*).

Dank' al Iltis lanĉiĝis, konatiĝis kaj diskutiĝis Karolo Piĉ (*La litomiŝla tomb-ejo*) kun siaj unuaj romanoj, poemaroj kaj eseoj. Atentindajn kontribuojn liveris William Auld (*Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto, Vereco Distro Stilo*), Marjorie Boulton (*Poeto fajrakora pri Julio Baghy*), Fernando de Diego (*Pri esperanta tradukarto, Pri literatura kritiko*) kaj Henri Vatré (*Neologisma Glosaro*). Kiel tradukintoj konfirmiĝis Roger Bernard (Clelia Conterno: *Unu tago post la alia*), Fernando de Diego (Encarnación Ferré: *Krado-mondo*), Reinhard Haupenthal (Joseph von Eichendorff, Johann Wolfgang von Goethe, Georg Büchner, Gotthold Ephraim Lessing, Heinrich Heine) kaj Henri Vatré (Antoine de Saint-Exupéry: *Nokta flugo, Tero de la homoj*).

La lerno-libro de Wilhelm kaj Hans Wingen plur-foje reeldoniĝis por kontentigi la bezonon de novaj lernantoj, same la vortaroj D-Eo de Hans Wingen kaj Eo-D de Max Butin kaj Joseph Sommer.

Ankaŭ la periodon Deubert (1988-1996) signas rimarkindaj titoloj kaj aŭtoroj. Inter la originaloj elstaras pliaj verkoj de Karolo Piĉ (*Ordeno de verkistoj*) kaj la satira verko de Jorge Camacho (*La Majstro kaj Martinelli*). Krom tio aperis represo de Henry Benjamin Hyams (*Nova sento*) kaj Heinrich August Luyken (*Paŭlo Debenham*); Fernando de Diego liveris *Drolaj Rakontoj* de Honoré Balzac, Roger Bernard la faman *La Butonmilito* (Louis Pergaud), Reinhard Haupenthal *Germanaj Klasikaj Rakontoj* kaj *Fraŭlino de Scuderi* (E. T. A. Hoffmann). Same ne mankis la esperantologio: André Albault elpaŝis per siaj *Naŭ prelegoj pri la Fundamento* kaj du ampleksaj studoj pri la land-noma demando kaj Karolo Piĉ venis kun sia *La interna vivo de Esperanto*.

En 1997 Irimi Haupenthal fondis la nunan Edition Iltis kun sia aktuala sidejo



en Bad Bellingen. Ĝis la somero 2011 aperis centoj da titoloj. En ĉi programo elstaras kvin fest-libroj: *Menade bal pŭki bal* (Reinhard Haupenthal), *De A al B* (André Albault), *Klaro kaj elasto* (Fernando de Diego), *Esperante kaj Ekumene* (Adolf Burkhardt) kaj *Instrui Dokumenti Organizati* (Claude Gacond).

Al la ceteraj pli ampleksaj volumoj apartenas la *Ido-Bibliografio* de Tazio Carlevaro kaj Reinhard Haupenthal, *Kritiko kaj recenzistiko* de Karolo Piĉ kaj *Prälats-Schleyer-Jahrbuch* kun studoj pri la vivo kaj verkaro de Johann Martin Schleyer.

Kunlabore kun la Prelato-Schleyer-Komitato, Edition Iltis reprenis verkojn de la aŭtoro de Volapük, eldonis plurajn ĉi-temajn prelegojn kaj Volapük-bibliografion de Johann Schmidt.

Reinhard Haupenthal daŭrigis sian tradukan laboron per verkoj de Nikolaus Breyer (*La memor-ŝtono*), Theodor Fontane (*Sub la pir-arbo*), Benedikto XVI (*Pri la kristana amo*), Arthur Schnitzler (*Songeskoj*) kaj Ricarda Huch (*La lasta somero*). Al la traduka kategorio apartenas ankaŭ la poemaro *Nur erik-floreto* aperinta post la morto de la aŭtoro Enn Uibo (kaj de la traduk-intino Hilda Dresen) dank' al la savoklopodoj de Jaan Ojalo.

Tom eksterkadre aperis pluraj eldonoj de gvidilo pri francaj bio-vinoj kaj (german-lingve) receptoj pri sarlandaj specialaĵoj. Al ĉi eksterserieco apartenas ankaŭ (same german-lingva) mariologia studo de Reinhard Haupenthal pri la doktrino de la Dua Vatikana Koncilio. Same eksterserie restas la represo de la doktoriĝaj tezoj de la Zamenhof-infanoj Adam kaj Sophie en la franca lingvo: ili ambaŭ studis medicinon en Lausanne.

La aŭtora gamo ege vastas same kiel ties vivo-datoj: de 1622 (naskiĝo de Molière) ĝis 2011 (morto de Jacques Tuinder). Al la plej maljunaj vivantaj aŭtoroj apartenas Antonio Marco Botella, Ĉestmír Vidman (1921- ), Max Mangold kaj Eli Urbanová (1922- ) kaj al la plej junaj Sébastien Moret (1974- ) kaj Mónica Mólnar (1975- ).

La verkoj de Edition Iltis laŭleĝe deponiĝas en Germana Nacia Biblioteko (Frankfurt, Leipzig), en la Landaj Bibliotekoj de Karlsruhe kaj Stuttgart. En la kadro de la "Planlingva Kolekto Haupenthal" ili eniras la Bavaran Ŝtatan Bibliotekon en Munkeno. Ankaŭ la Biblioteko Hodler en Rotterdam akiras ekzempleron.



# Poemoj de Afanasij Fet

\* \* \*

*Bildo rav-serena,  
plej amata nun:  
Blanka vast' ebena,  
Ronda plena lun',  
Volbo diafana,  
Brila neĝo nur,  
Kaj de sled' lontana  
La soleca kur'.*

\* \* \*

*Ŝtorm' en ĉielo vespera,  
bruo kolera de mar' –  
ŝtormo en maro kaj pensoj,  
multa turmenta pensar' –  
ŝtormo en maro kaj pensoj,  
ĥor' de kreskanta pensar' –  
nigra nubaro fluganta,  
bruo kolera de mar'.*

\* \* \*

*Mia vitej' transfenestre kreskadas plej bele,  
Lumon forŝirmas. Kaj jen – de la fenestro duon'  
Supre kaŝitas en densaj verdaĵoj, kaj inter folioj  
Kvazaŭ intence sub vitr' ekas flaviĝi grapol'.  
Kara, sufiĉas, ne tuŝu! Por kio spirit' de l' detruo!  
Vi por vinbero-plukad' manon etendos al kort', –  
Blankan kaj pufan maneton najbaroj facile rekonos,  
Kaj ili diros: ŝi lin kaŝe vizitis en hejmn'.*

\* \* \*

*Ĉio bruas en viv' multkolora,  
Tamen vanas gajec' de l' medi':  
Mi sen vi sopiregas, angora,  
Vi rideton forportis de mi.  
Kaj malofte, nur kiam vesperas,  
Post enuoj kaj penoj de l' tag',  
Via bildo por mi reaperas,  
Kaj ridetas mi al la imag'.*

\* \* \*

*Per kora sango skribatas al vi ĉi asertoj,  
Ja, pro l' disiĝo por ambaŭ doloras la spertoj,  
Vanas ja, por malsanul' al libero aspiri,  
Al travivaĵoj malnovaj ne eblas reiri,  
Kaj ja en ĉio, nutrinta la amon pasian,  
nun pli facilas por ni skoldi unu alian.*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Kiam oni parolas pri **Afanásij Afanasjeviĉ Fet**, oni ne povas eviti la implikitajn cirkonstancojn de liaj nomo kaj deveno. Liaj gepatroj estis germanoj: asosoro Johann Foeth kaj Charlotte Becker. En septembro 1820 la graveda 22-jara Charlotte sekrete fuĝis el Germanio kun la 45-jara Ruslanda bienisto Afanasij Neofitoviĉ Ŝenŝin kaj ekloĝis en ties bieno Novosjolki (Mcenska distrikto, Orjola gubernio).

En ĉi tiu bieno la 23an de novembro (Gregorie: la 5an de decembro) naskiĝis la filo de Charlotte, kiu estis ortodokse baptita kiel Afanasij kaj registrita kiel filo de Ŝenŝin. En 1822 Charlotte ortodoksiĝis kaj kiel Jelizaveta Fet edziniĝis kun Ŝenŝin. Sed en 1834 la konsistorio de Orjol decidis, ke, ĉar la knabo naskiĝis antaŭ la geedziĝo, li devas porti la familinomon de sia germana patro, do li iĝis Fet (foje: Fjot) kaj perdis la Ruslandan civitanecon kaj ne povis heredi la nobelecon de Ŝenŝin. Li ricevis hejman edukadon, poste lernis en la germana pensionato en la urbo Werro, Liflanda gubernio (nun Võru en Estonio), kaj en 1838 studentigis en la filozofia fakultato de la Moskva universitato.


Kiel 20-jara studento Fet publikigis sian unuan poemaron kaj komencis kunlabori en *Oteĉestvennyje zapiski* (La analoj de la Patrujo), kie aperis multaj liaj poemoj. En 1845 Fet armeaniĝis kaj servis kiel oficiro ĝis 1858. En la 1850aj jaroj li kunlaboris en *Sovremennik* (Samtempulo), sed forlasis ĝin pro politikaj kaŭzoj. Pliaj poemaroj aperis en 1850 kaj 1856, kaj la plej bonaj en la unua volumo de lia verkaro (en la dua estis tradukoj) en 1863, kiam li jam aĉetis bienon Stepanovka en la distrikto de sia naskiĝo kaj loĝis tie kun sia edzino Maria el la fama kuracista familio Botkin.

Li fariĝis prosperanta bienisto kaj ofte verkis kontraŭ-reformajn eseojn en la rubriko *El vilaĝo* por la konservativa *Russkij vestnik* (Ruslanda heroldo). En 1873 li ricevis sian familian nomon Ŝenŝin kaj la nobelecon, sed plu subskribis siajn verkojn kiel Fet. En 1881 li aĉetis palaceton en Moskvo, revenis al poezio kaj publikigis kvar volumojn de *Vesperaj fajroj*. Li forpasis la 21an de novembro (la 3an de decembro) 1892 en Moskvo.

Liaj poemoj elstaras pro la delikata lirikeco kaj muzikeco, bonega kono de la homo, sentoj, naturo, animstato. Precipe famaj estas liaj “senverbaj poemoj” (ekzemple, la du supraj ĉi-paĝe). La poeton de l' belo pro lia “pura arto” ofte kritikis la “progresemluloj”. Li ankaŭ multe tradukis el la lingvoj klasikaj kaj la germana, interalie, la tutan Horacion kaj *Faŭston*.

## Sufiĉe interesa, apenaŭ bezonata

**Cavadi, Augusto. *Mafio klarigata al turistoj* / Tradukis el la itala, pri-notis kaj adaptis Michela Lipari, Carlo Minnaja. — Trapani: Di Girolamo, 2011. — 64 p.**



La libreto *Mafio klarigata al turistoj* deklare aperis ĉe Di Girolamo, kiu krome publikigis ĝin en ses aliaj lingvoj. Sur la dorskovrilo estas skribita: “La esperanta versio estas adaptita kaj printita cele al vasta internacia publiko...”, do oni povas esperi, ke la laboro estis farita konscience.

Natura sagaceco rajtigas kompreni, ke evidente temis pri iu kampanjo, kiun okazigas la eldonejo, volante laŭeble plejmulte disvastigi la libron (alia demando, kiucele ili lanĉis la tuton). Verŝajne do italiaj esperantistoj, iel eksciinte pri la afero, proponis envicigi Esperanton. Se tiel, ili faris tute bone, ĉar la ekstera mondo ricevis plian pruveton, ke Esperanto estas tute samrajta kaj sampova lingvo, kiel la ceteraj.

Sed leviĝas demando, ĉu esperantistoj mem bezonas ĝin, la libron? Oni apenaŭ povas imagi esperantiston, kiu, planante sian viziton en Italion (ni ne forgesu, ke oni anoncas la libron kiel porturistan!), aĉetos (cetere, kie?) libron ne pri vidindaĵoj de Romo, Florenco, Venecio, sed pri sicilia mafio, des pli — en Esperanto.

La afero estas des pli ambigua, ĉar la libro mem, kvankam intence tro malkonciza, prezentas vere interesajn faktojn, kiujn oni legas se ne *plezure*, sed almenaŭ kun vera interesiĝo. Kelkaj faktoj estas bone konataj, sed kelkaj ne. Ekzemple estis sufiĉe interese legi la mallonge prezentitan historion de Giovanni Falcone, murdita juristo. Krome la libro neniigas la miton pri “mafio nobla, kavalireca, lojala en sia interno kaj protektanta la malfortulojn” — ĝi neniam ekzistis, ĉar interalie “ĝi neniam produktis varojn aŭ servojn, sed prirabis tiujn, kiuj... klopodis krei ion pozitivan”. Sciate, ke kelkaj kinofilmoj (plejĉefe, certe, *La baptopatro*) prezentas mafion sufiĉe romantika kaj jes ja nobla kaj kavalireca.

Krome la aŭtoro interese priskribas la rilatojn inter mafiaj viroj kaj virinoj, rakontas pri trakto de la mafio fare de eklezio, kaj faras konkludojn, ke ĉar

“perfido kaj dezirego al perforto apartenas... al la genetika posedaĵo de la homaro [...] ni devos ankoraŭ dum longa tempo alfronti la organizitan krimularon mafistilan... sed ne poreterne... kiel ĉiuj homaj fenomenoj ĝi havas komencon, evoluon kaj havos do finon”.

Ni menciis “intencan malkoncizigon” de la libro, sed fakte temas pri teksto, kiu estas iom pli ampleksa ol ordinara granda artikolo, sed kiun oni tre volis fari libro kaj jes faris. Konsiderante la ĝeneralan amplekson de la libro (64 paĝoj), grandan tiparon, multajn vakajn paĝojn kaj ok (!!!) foliojn kun ial itala vorto *annotazioni* (notoj), la penoj estas troevidentaj kaj iom amuzaj.

Mi konsilus al la rajtoposedantoj iom poluri la tekston, forigi vakajn lokojn kaj “annotazioni”, fari el la libro por-legan dosieron (PDF aŭ simile) kaj proponi ĝin senpage al la Esperantopubliko. Tiel la interesa teksto ricevos meritan kvanton da legantoj.


**Konstanten Kryszakov**

## Rekomendinda. Por 50 familioj

**Mattos, Geraldo. *La bona pineto*. — Chapecó: Fonto, 2008. — 23 p.**

Porinfanaj libroj en Esperanto treege malmultas, kaj plejparte ili estas tradukoj de naciaj fabeloj, aŭ tre simplaj versaĵetoj. Do la libreto de Geraldo Mattos *La bona pineto* estas preskaŭ unika.

Laŭ la enhavo ĝi estas destinita al geknaboj eble 6–7-jaraj. La literoj estas grandaj — sed ne tiom, kiom en aliaj libroj, kiujn infano povus legi mem. Ankaŭ ilustraĵoj forestas — nur sur la kovrilo videblas infana desegnaĵo. Do supozeble la gepatroj devas voĉlegi la



fabelon, kaj eventuale proponi al la infano mem ilustru ĝin poste. Mi ne rerakontos la enhavon — ĝi estas pli-malpli tipa por fabeloj, ankaŭ la moralizaĵo estas klara: necesas fari bonon al homoj, kaj malfortulo ofte estas pli helpema ol fortulo.

La fabelo estas verkita en modela Esperanto sen simpligoj. La stilo estas tipe fabeleca, kun ie-tie ripetataj ritmerimaj frazoj, kiel “...nokto, kiam la ventoj de la nuboj kaj la dentoj de la bestoj eliras ĉasi kaj frakasi...”, aŭ “...de la rigida arbo, de la rapida birdo kaj de la fluida rivero”. Kelkaj esprimoj apenaŭ konvenas — ja “peto, kiun pafis la arko de lia buŝo per la sago de lia lango” en porinfana fabelo sonas iom nenature. Aliflanke, ne tre konvena por 6–7-jaruloj estas la frazo “la brazila pino, science nomata araŭkario”; kaj por geknaboj pliaĝaj tro naive aspektas la tuto cetera. La gepatroj devas scii, kio estas *Parnasa Gvidlibro* kaj esti pretaj klarigi tion al la infanoj.

Do, oni devas perfekte posedi Esperanton (la infanoj — denaske) por ĝui tiun fabelon. Se ĝi aperus, kiam mia filino estis 6–7-jara — mi tre ĝojus. Entute, en la mondo troviĝas eble nur 50 familioj, por kiuj *La bona pineto* plene utilas — sed al tiuj ĝi vere rekomendindas.

**Valentin Melnikov**

## Memortago pri Kalocsay

(HeKo) En Abaújszántó, kie la 6an de oktobro 1891 naskiĝis la hungara Esperanto-poeto Kolomano Kalocsay, 120 jarojn poste okazis festo omaĝe al li.

En la korto de la Historia Muzeo oni vizitis la memorĉambron de Kalocsay kaj aŭskultis la festparoladon de la urbestro, la rememoron de Adri Pásztor kaj la festparoladon de Imre Szabó, prezidento de Hungaria Esperanto-Asocio (HEA). Post la paroloj Anjo Amika interpretis du kantojn en Esperanto.

Ĉe la busto de Kalocsay, en la urba ĉefstrato, infangrupo prezentis Esperante tri mallongajn fabelojn. Poste loka popolkantisto István Nagy kantis, kaj d-ro Blazio Wacha salutis la ĉeestantojn nome de la Amika Rondo Kalocsay.

Ĉe la stratangulo de la strateto Kalocsay kaj la urba ĉefstrato, kie situas la domo, en kiu Kalocsay loĝis dum mallonga tempo, Adri Pásztor festparolis.

En ĉiuj tri lokoj estis metitaj florkronoj nome de la urbodomo, de HEA, kaj de la bazlernejo de Abaújszántó.

**Anna Bartek**

## Incendio ĉe Vinilkosmo

Nia muzika redakciano Flo Martorell informis ke la nokton de la 18a-19a de septembro fajro grave damaĝis *Vinilkosmon* — unu el la plej sukcesaj Esperanto-entreprenoj, kiun Flo fondis en Donneville. Li skribis al ni kelkajn horojn post la incendio:

« La ekzercejo 7, kie ekzercis tri rokaĵ bandoj, kaj la stokejo de *Vinilkosmo* / EUROKKA (kie estis la sonsistemo, materialo por la studio, kaj la plej granda parto de la stoko de la K-diskoj de *Vinilkosmo*) estas detruitaj pro incendio.

« Unu el la bandoj ekzercis tie ĝis la 22a horo, kaj verŝajne la incendio komenciĝis post ilia foriro. Iom post la noktomezo malŝaltiĝis la elektro, kaj tiam mi ekserĉis la kialon. Subite mi kaj mia frato konstatis la fajron, sed la tegmento jam brulis, kaj ne eblis ion fari. Ni tuj vokis la fajro-brigadon, kiu venis post 15 minutoj kaj laboris ĝis la 4a kaj duono. Eble cigaredo estis malbone estingita, aŭ ili ne malŝaltis la elektron forirante — mi ne scias, la asekurkompanio faros enketon.

« Estas vera katastrofo por *Vinilkosmo* kaj EUROKKA kaj por la Studio de La Trappe, ĉar ni perdis grandan parton de nia sonmaterialo kaj la diskostokon... La fajro-brigadistoj provis savi kion ili povis, kelkaj centoj da diskaj estis savitaj ... la tuta sonmaterialo estas detruita.

« La fajro-brigadistoj faris ĉion, por ke la apuda registrejo kaj ripozejo ne ekbrulu. Feliĉe, ili sukcesis kaj la studio estis savita, sed la perdita materialo kruele mankos... Feliĉe neniu persono estis vundita».

Ni kunsentas kun Flo kaj esperas, ke li sukcesos restarigi *Vinilkosmon*, kiu laboras por la tuta esperantista komunumo. Ni alvokas niajn legantojn mendi la restintajn diskajn kaj uzi la mp3-elŝutejon de *Vinilkosmo*. Intertempe klariĝis ke centoj da diskaj estis savitaj, sed la tekstolibretoj estis damaĝitaj — tiuj diskaj estis aĉeteblaj kontraŭ forte rabatita prezo.

Detalojn pri la mendobleco vidu en la reto:

<http://vinilkosmo.com>



Tomas Tranströmer, la plej nova literatura nobelpremiito

## T en tekstamaso

**Wolfgang Kirschstein, redakciano de *La Ondo*, ekde la 2004a jaro ĉiujare rakontas pri la novelektita Nobel-premiito pri literaturo. Tuj post la proklamo de la premiito 2011 li verkis la suban tekston.**

2011 ne estis escepto; ĉiam oktobro ekkirlas la karuselon kun la kandidatoj por la Nobel-premio en literaturo. Kaj elfalis, kiel kutime, la “kutimaj suspektinduloj” — Amos Oz el Israelo, Haruki Murakami el Japanio, Adonis kun libana pasporto, kaj ankaŭ la lastminuta “favorato” Bob Dylan.

Tiuj, kiuj bone konas Tomas Tranströmer, diras, ke la decido estas prudenta kaj saĝa; tial la felietonoj en la tuta mondo nuntempe arigas superlativojn post superlativoj. Por la aliaj validas tio, kion skribis sveda tagjurnalo: “Nun la tuta mondo volas legi liajn poemojn”. Tranströmer jam estas la plej tradukita sveda poeto — li jam haveblas en 55 lingvoj, sed estas evidente ŝatata nur de la feliĉa malplimulto. Almenaŭ en Svedio li estas bone vendanta verkisto: la eldonkvanto de *Funebra Gondolo* de 1996 atingis 30 mil ekzemplerojn, kio estis sensacio sur la malgranda sveda libromarkato.

Do, nun estas ankaŭ por ni la tempo konatiĝi kun li. Tranströmer ne skribis multe — lia kompleta verkaro, ekde 17 poemoj de 1954 entute ampleksas malpli ol 400 paĝoj. Li densigas, aŭ kiel diris kritikisto: se bezonatas 10 vortoj, iuj uzas 100 kaj Tranströmer unu. Densigo estas la signo de li. Kaj ankaŭ klaraj bildoj, kiuj ebligas novan aliron al la mondo, tiel la Nobela komitato.

Antaŭ du jardekoj Tranströmer havis apopleksion. Ekde tiam li preskaŭ

ne plu povas paroli kompreneble. Nur la edzino Monica komprenas komplete, kion li volas diri. Dum intervjuoj Tranströmer komencas diri kiom multe li povas kaj poste la edzino kontinuas la fadenon kaj la edzo aprobas — bela harmonio de spiritoj. Tranströmer defiis la handikapon. Li devis batali kontraŭ la perdo de la lingvo. Li ĉiam ŝatis vojaĝi. Li sukcesas denove vojaĝi kaj ankaŭ aperas de tempo al tempo dum lirikaĵ kunvenoj eĉ en Ĉinio. Li estis antaŭ sia malsano unu el la plej vojaĝemaj poetoj — spuroj de vojaĝimpresoj tra la mondo aperas dise:

*Juna sinjorino ploris ĝuste en sia manĝaĵo en la hotelo post tago en la urbo.*

Li ankaŭ povas denove ludi pianon per sia sana maldekstra mano. Muziko estas unu el la temoj de Tranströmer. En sia juneco li volis fariĝi muzikisto. Li ne atingis tiun celon, sed li estis preskaŭ profesia pianisto:

*La kvin kordoj diras ke ni ne povas fidi ion  
alian kaj ili sekvas nin  
parton al la vojo tien  
Kiel kiam la lumo estingiĝas sur la ŝtuparo  
kaj la mano sekvas —  
konfide — la blindan manrelon  
kiu gvidas tra mallumo.*

Tranströmer estas sendube meritplena verkisto. La kvalito estas, ke liaj poemoj temas pri la ekzistanta mondo en naturmetafizika robo. Premii preskaŭ silentan verkiston probable estas ankaŭ signalo kontraŭ la amasaj subnivelelaj literaturaĵoj, kiuj altrudas sin ĉie sur la merkato. Tranströmer konscias pri tio. Ie li skribis pri la mikreco de sia verkaro, ke ĝi estas kiel “T en tekstamaso”, do facile pretervidebla. La verkoj de Tranströmer neniam obeis al modoj — Tranströmer ja estas engaĝita verkisto. Sed neniam li falis en la kaptilon de politika kliŝo aŭ kiĉo.

Sed tio estas ankaŭ la manko de tiu elekto. La verkaro de Tranströmer jam estas kompleta. La Akademio elektis verkiston, kiu ne plu donas novajn impulsojn, kaj kies plej grava epoko estis antaŭ kvindek jaroj.

La premiito de 2010, Mario Vargas Llosa, daŭre donas novan intelektan stimulon al tiuj, kiuj ankoraŭ legas. Espereble en la sekva jaro la Akademio trovos premianda kandidaton kun pli aktiva voĉo en la nuna kaj estonta tempo.

**Wolfgang Kirschstein**

## Savi la vivon! (4)

|  |                  |
|--|------------------|
| Muriel Shackleton (Britio) . . . . .   | 22,73            |
| Pavel Polnicky (Ĉeĥio) . . . . .   | 150,00           |
| S. Beglaryan (Francio) . . . . .   | 50,00            |
| Mihaelo Castaing (Francio) . . . . .   | 76,88            |
| Anne Jausions (Francio) . . . . .  | 20,00            |
| Christiane Altrogge (Germanio) . . . . .   | 28,00            |
| Horst Vogt (Germanio) . . . . .  | 50,00            |
| Ranieri Clerici (Italio) . . . . .   | 200,00           |
| Kleno Fantin (Italio) . . . . .  | 40,00            |
| Treffle Mercier (Kanado) . . . . .   | 41,21            |
| Anonima (Nederlando) . . . . .   | 10,00            |
| Jarl Hammarberg (Svedio) . . . . .   | 22,10            |
| E-Klubo de Stockholm (Svedio): Åke Ahlrén, Hans Dahl, Sten Hannerz,<br>Ole kaj Kaisa Hansen, Ulrika Hoppe, Claes-Göran Ingestedt, Sven Linnér,<br>Bertil Nilsson, Yngve Sörman, Marianne Westman, Nekonato . . . . . | 382,93           |
| Maria Jackowska (Pollando) 100 zł . . . . .  | 23,00            |
| Halina Oleszek (Pollando) 100 CAD, 100 zł . . . . .  | 95,46            |
| Hanna Skalska (Pollando) 500 zł . . . . .  | 118,48           |
| Eric Smith (Britio) 20 GBP . . . . .   | 22,80            |
| Larisa Ŝapoŝnikova (Ruslando) 4000 rub. . . . .  | 91,68            |
| <b>Entute ekde 19 aŭg ĝis 15 okt 2011 . . . . .</b>  | <b>1445,27</b>   |
| <b>Je la 18a de aŭgusto 2011 . . . . .</b>   | <b>25.193,18</b> |
| <b>Je la 15a de oktobro 2011 . . . . .</b>   | <b>26.638,45</b> |

La monokolekta kampanjo brile sukcesis kaj reprovus la solidaremon kaj helpon de la esperantistaro. Koran dankon pro la malvaraj donacoj, grandaj kaj etaj, kiuj helpis al Halina elteni la problemlenan restadon en Moskvo! Post la operacio Halina fartas bone — pli bone ol plimulto de ŝiaj operaciitaj samsortuloj.

La resto, kiu estas nun en nia dispono, estas kaj estos uzata por la postoperacia flegado kaj kuracado, por medikamentoj, por necesaj ĉiumonataj vojaĝoj inter Kaliningrado kaj Moskvo. La donacojn, kiujn ni ricevos post nia baldaŭa reveno al Kaliningrado, ni plu publikigos en La Ondo de Esperanto, kies eldonanto kaj redaktoro laŭ siaj fortoj plu laboros por Esperantujo: verkante, tradukante, redaktante, eldonante, prelegante.

Aleksander Korĵenkov

## Ricevitaj libroj

Cavadi, Augusto. *Mafio klarigata al turistoj* / Tradukis el la itala, printis kaj adaptis Michela Lipari, Carlo Minnaja. — Trapani: Di Girolamo, 2011. — 64 p. — [Recenzoekzemplero].

*Homarane*: Kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio. Jaro 1, numero 1 / Redaktis Bertil Nilsson. — La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2010. — 213 p. — [Recenzoekzemplero].

*Jarlibro 2011* / Redaktis Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2011. — 286 p., il. — [Donaco de UEA].

Mattos, Geraldo. *La bona pineto*. — Chapecó: Fonto, 2008. — 23 p. — [Recenzoekzemplero].

Nordenstorm, Leif; Lörnemark, Christer; Korĵenkov, Aleksandr; Grundström, Tuomo. *Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli* / Alkusanat Daniel Tarschys. — Helsinki: Suomen Esperantoliitto ry., 2011. — 146 p. — [Donaco de Tuomo Grundström].

## Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako, 2011/11; Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2011/2; Esperanto Aktuell, 2011/4; Esperanto en Danio, 2011/4; Esperanto sub la Suda Kruco, 2011/107; Esperanto, 2011/7-8,9; Esperantolehti, 2011/4; Frateco, 2011/93; KAE-informilo, 2011/75; Kontakto, 2011/3; La Brita Esperantisto, 2011/971; La Lanterno Azia, 2011/7,8-9; La Ondo de Esperanto, 2011/8-9,10; La Revuo Orienta, 2011/7,8-9; Monato, 2011/8-9; Norvega Esperantisto, 2011/4; REGo, 2011/4; Scienco kaj kulturo, 2011/4; Scottish Esperanto Buletin, 2011/2; SES informas, 2011/3,4.

## Heroldo: Nova redaktoro

Tri personoj kandidatiĝis por la posteno de ĉefredaktoro de *Heroldo de Esperanto*, kiu vakas de post la retiriĝo de Aneto Muhlemann pro grava akcidento kiu perturbis ŝian vivoritmon. Ĉiuj tri estas virinoj: Anna Bartek, Paola Birgit Giommoni, Etel Zavadlav. Tial ke la unua ne plenumis la selektan trejnadon, restis nur du.

KALiFo (la komitato de LF-koop) sub la prezido de Marc Hiltbrand, decidis krei teamon kiu kunlaboros laŭ diversaj gradoj en la redakcio de *Heroldo de Esperanto*:

Etel Zavadlav redaktos la duan kaj kvaran paĝojn, kun tendenco transpreni ankaŭ la ceterajn du paĝojn. La trian paĝon, pri kulturo, redaktos Perla Martinelli. La unuan paĝon prizorgos Dieter Rooke kaj Giorgio Silfer. Krome Rooke restos kongresa redaktoro.

La nova aranĝo daŭros ĝis la ĝenerala Asembleo de LF-koop, kiu definitive decidis pri la ĉefredaktora posteno fine de februaro 2012.

HeKo

## Femina: Nova adreso

Pro la transloĝiĝo de la redaktoro, ankaŭ la redakcio de *Femina* havas novan korespondadreson, jam validan:

✉ Femina, c/o Esperanta Naturamikaro, Apartado de correos 20054, ES-29080 Málaga, Hispanio / Espagne.

La retadreso restas la sama:

✉ [redperla@esperantio.net](mailto:redperla@esperantio.net).

La adresoj de la eldonejo kaj administrejo (por ĉia korespondado pri abononj, financoj kaj simile) restas la samaj:

✉ [lf-koop@esperantio.net](mailto:lf-koop@esperantio.net)

✉ LF-koop, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

HeKo

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

**www.monato.net**

**Flandra Esperanto-Ligo**  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

**P**or la *Proverboj trovendaj 3* el la julia *Ondo* venis 20 respondoj — ĉiuj tute ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Brennus Legrae, Malcolm Jones (Britio), Marek Blahuš (Ĉeĥio), Hans-Burkhard Dietterle, Edeltraut Henning (Germanio), Bruno Lehtinen, Erkki Kemppainen (Finnlando), Jackie Huberdeau, Anne Jausions (Francio), Zbigniew Tylkowski, Mirosława Kubicka, Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Jadwiga Benicka (Pollando), Vladimir Romanov, Roman Mutin, Svetlana Konjašova, Viktor Alikin, Nikolao Neĉajev (Ruslando).

La libropremion kaj niajn gratulojn ĉi-foje ricevas **Viktor Alikin**.

#### La ĝustaj respondoj:

1. Ĉiu besto zorgas pri sia nesto.
2. Korvo al korvo okulon ne pikas.

## Du glasoj da portovino

Sinjoroj A kaj B havis 16 uncojn da portovino kaj du 8-uncajn glasojn. La glasoj estis subskribitaj kaj havis mezurstrekojn. La sinjoroj plenigis la glasojn, sed hundeto, kiu ankaŭ tre ŝatis portovinan, subite fortrinkis 5 uncojn el la glaso de sinjoro B. Samtempe la perpleksa sinjoro B fortrinkis 3 uncojn el la glaso de sinjoro A.

— Aŭskultu min, — diris s-ro A, — estus maljuste, se nur vi suferos pro la hundo. Mi verŝos portovinan el mia glaso al la via, por ke ni havu la saman kvanton da vino.

— Mi konsentas, ke ni devas dividi la perditajn 5 uncojn inter ni, sed ne forgesu, ke mi fortrinkis 3 uncojn el via glaso, — diris s-ro B kaj verŝis enhavon de sia glaso en la glason de s-ro A, — vidu, mi redonis ilin al vi.

— Nun ni dividu la restaĵon, — aldonis B, kaj A verŝis duonon da portovino el sia glaso en la glason de B.

— Vidu, ni havas saman rezulton, kiun ni havas, se ni uzus mian proponon, — diris A, — ni ambaŭ havas po duonon da glaso, kaj do ni estas kvitaj.

Demando: Ĉu la du sinjoroj bone kalkulis? Se ne, bonvolu restarigi la justecon. (Estus bone se vi solvos la enigmon mense, sen papero). La respondon sendu al la redakcia adreso poŝte aŭ rete antaŭ la 5a de decembro 2011.

**Aleksej Korĵenkov**

La aŭtorino de la suba bildo, Eva Fitzelová el Slovakio, gajnis per ĝi la konkurson de Lernu! (vd. p. 13) kaj ricevis belan porteblan komputilon.



## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### Muroj de miljaroj?

Dum inter viajn du fermurojn, mia kara, premiĝos mia kapo kaj mia lango vibros kun fervoro! (Joseph Skibell: *A Curable Romantic*. Algonkin Books of Chapel Hill 2010, Ĉapitro “Milojn da jesoj”, p. 411)

### Dankon pro viaj penoj!

... necesos kaj gravos, ke vi esperantistoj ... povu sendi al ni flugfoliojn ... propagandilojn ... insignojn, glumarkojn, Esperanto-flagojn, bandoloron. (ADJE Adjévi, yahoo-grupo esper-inform, mesaĝo 5027, 1 okt 2011)

### La certa vojo al la fina venko

Estus bone kaj progresigus nian aferon, se dum unu jaro aŭ prefere pli longe neniu farus iun ajn novan iniciaton. Sufiĉas la ĝisnunaj. (Osma Buller, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 19848, 26 sep 2011)

### Mem elektita diasporo

La transformoj kaj luigo al nova familio devigis la prezidanton kaj la revizoron de KCE al translokigo, parte al alia etaĝo en la domo mem, parte al alia apartamento en Ĉaŭdefono, parte eksterlanden. (Pli vasta la Esperanto-Domo en Svislando, HeKo 491 5-B, 17 sep 2011, [esperantio.net/index.php?id=1801](http://esperantio.net/index.php?id=1801))

### Kontinentoj da verda rubo

Ju pli da UEA-membroj el Eŭropo, des pli da espero venas, ke ne nur balasto estos en UEA. (Eŭgeno S.Perevertajlo, yahoo-grupo uea-membroj, mesaĝo 19820, 19 sep 2011)

### Ĉu suba vermo ronĝas?

Iu demandis, kial UEA ne subtenias jaron de Tibor Sekelj. (Ferenc Harnyos: Estraro respondas // Esperanto, 2011, №9, p. 181)

### Ne laste sed ja balaste

Ĉiam kiel la unua skribis Renato, sed rapide la diskutoj velkis. (Barbara Pietrzak, yahoo-grupo komitato-de-uea, mesaĝo 6847, 8 sep 2011)

### Se mankas problemo, elpensu

... ĝenerala problemo en Esperanto ŝajnas al mi la poemoj kaj la poemistoj. (Renato Corsetti: “Diru tridek tri”, [ie.j.Esperanto.it/kirek/gramatiko/Diru%20tridek%20tri%20-%20203.pdf](http://ie.j.Esperanto.it/kirek/gramatiko/Diru%20tridek%20tri%20-%20203.pdf))

### Ĉio pli kostas

... ni proponas akcepti la Karigon al la Statuto. (Audrys Antanaitis, prezidanto de TEĴA: Cirkulero al membroj de TEĴA, Vilno, 6 jun 2011)

Plukis István Ertl

**La Ondo invitas al kunlaboro en Mozaiko tiujn, kiuj povas kompili krucvortenigmojn, ŝaradojn kaj aliajn enigmojn. Ankaŭ pentristoj kaj karikaturoj estas serĉataj. Skribu al ni rete: [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru).**

## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest

KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano

Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Meksiko:** Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos, Av. 523, No.187, 1a Seccion de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero México D.F., CP 07969

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City, NZ-0630

**Pollando:** PEA, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Ruslando.** La 9an de oktobro en la salono de la Usona kulturcentro, ĉe la Fremdlingva biblioteko en Moskvo, mankis sidlokoj por malfruintaj dezirantoj vidi kaj aŭdi la prezentadojn en la lingva festivaletto (vd. p. 11), kiun okazigis la Moskva junulara Esperanto-klubo EK MASI. (Irina Gončarova)



**Meksiko.** En la 11a Meksika Esperanto-Kongreso (vd. p. 9) fondiĝis Meksika ILEI-sekcio. Sur la foto estas (de maldekstre) vicprezidanto de ILEI Duncan Charters kun la estraranoj de la sekcio: Manuel García Juarado Taracena, Carlos Fernando Hernández (prezidanto), Gabriela Reyes Zárate. (Martin Schäffer)



**Pollando.** Inter la kulturaj prezentoj en la 27aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto (Poznano, vd. p. 7) elstaris *Tamburatorio* — “monodrumo” de Radosław Nowakowski, tamburisto el la grupo *Osjan*; kiu ankaŭ aranĝis interesan libroinstalajon. (Joanna Filipowicz-Choroszuca / Przemysław Wierzbowski)

# HISTORIO

## DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*  
Serio *Scio*, Volumo 5  
128 paĝoj, 12 eŭroj

# *Mi estas homo*



Originalaj verkoj de  
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*  
Serio *Scio*, Volumo 6  
288 paĝoj, 24 eŭroj

# HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj  
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*  
Serio *Scio*, Volumo 8  
360 paĝoj, 27 eŭroj

*Aleksander Korĵenkov*



## ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*  
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5  
16 paĝoj, 3 eŭroj

*Mendu en via kutima libroservo*